

pola

sendependa revuo
de polaj esperantistoj

esperantisto

fondita en 1906 ★ n-ro 5/2006 ★ ISSN 0032-2431



*Finiĝis
ARKONES' 2006
duboj restis...*

5

2006
Jubilea jaro

Enhavtabelo:

3	(mal)espere... <i>Kazimierz Leja</i>
5	Forpasis William Auld <i>Libera Folio</i>
7	Ĉu ekzistas Esperanto-kulturo? Malnova intervjuo kun William Auld <i>Barbara Pietrzak</i>
9	La infana raso (fragmento) <i>William Auld</i>
12	Kiĉo de malfervora esperantisto <i>Aleksandr Milner</i>
17	Eŭropa identeco en la pola Davos <i>Roman Dobrzyński</i>
21	Prezentado de la ĵalstoka medio de esperantistoj <i>Ela Karczewska</i>
22	83a Germana Esperanto-Kongreso <i>Stanisław Mandrak</i>
23	Inter artaĵoj naturaj kaj homaj <i>Lidia Ligęza</i>
26	Alia Venecio <i>Spomenka Štimatec</i>
29	La novelaro de Raymond Schwartz „Vole... novele: aŭ kvindek jaroj da noveloj 1920–1970” <i>Horst Vogt</i>
33	El Tehrano al esperantistoj <i>Stanisław Śmigielski</i>
34	Preskaŭ ĉio pri la prepozicio ANTAŬ <i>Czesław Baranowski</i>
36	Judaj anekdotoj kaj ŝercoj <i>Josef Shemer</i>

Kovrilpaĝe: *arta motivo sur tegmento de la ternejo „Lejery” en Poznań, kie de kelkaj jaroj okazas ARKONES – Artaj Konfrontoj en Esperanto.*

Pli abunda raporto aperos en la 6^a kajero de PE.

Pola Esperantisto
sendependa revuo de polaj
esperantistoj. Aperas 6 fojojn jare.
N-ro 5/2006 – ISSN 0032-2431
eldonkvanto (naktad): 260 ekz.

Redaktas: Tomasz Chmielik, Kazimierz LEJA (ĉefredaktoro), Lidia Ligęza. Konstantaj kunlaborantoj: Czesław Baranowski, Danuta Kowalska, Teresa Nemere, Stanisław Śmigielski.

Ĉiujn korespondadojn kaj kontribuojn sendu al la Eldonejo HEJME:

TTT-paĝo: www.hejme.com.pl

Retpoŝto: hejme@hejme.com.pl

Tel.: (+48 32) 265 00 38 (nur vespere!)

La redakcio rezervas al si rajton mallongigi kaj korekti la tekstojn.

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al: Wydawnictwo Hejme, PL 41-250 Czeladź, str. Wąska 21, skrytka 59
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al: UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto: <leja-t>. Por aerpoŝta sendado aldonu 6 EUR. Nepre informu eldonejon pri via pago!

(mal)espere...

Atendata de dekelkaj aktivuloj de pola Esperanto-komunumo diskuto pri la pola E-movado, ties nuntempo kaj speciale ties perspektivoj, kviete enskribiĝis en historion. Organizita dum ARKONES, gvidita de junulara estro el Varsovio, Irek Bobrzak, evidente pro eksterkulisa, nervoza atmosfero, ne allogis multajn diskutantojn. Homoj (eĉ funkcianoj de PEA!) de longe estas ofendataj kaj misinformataj pri la agado de siaj gvidantoj. Tio, por kelkaj miaj diskutatnoj similas pli al stalinismaj epoko kaj kutimoj, kaj kaŭzis ilian malesperan silenton.

Laŭ miaj kalkuloj partoprenis la oficialan diskuton inter 4 kaj 6 personoj, inter kiuj plej ofte: la gvidanto mem (Irek), s-ro Stanislavo Mandrak (PEA), kaj la kunredaktoro de PE, Tomasz Chmielik. Ĉio okazis en la salono, kie sidis ĉ. 40 aliaj personoj.

Kvankam mia celo ne estas strikte prezenti eldirojn de ĉiuj partoprenantoj en la diskuto, jen la mallonga resumo por tiuj, kiuj ne ĉeestis la diskuton.

1. S-ro Stanislavo Mandrak prezentis problemojn, kun kiuj baraktas la Ĉefa Estraro de PEA (manko de junularo en la strukturoj de la organizaĵo, nerespondecaj multaj Fi-

lio, malfaciligantaj i.a. registriĝon de PEA en la Landa Registro de Societoj, de kio dependas la ebleco ricevi 1% da impostoj), kaj provis respondi demandojn kaj kritikojn. Ili ne estis tamen multaj.

2. Plej aktive pri mankoj kaj bezonoj provis diskuti Tomasz Chmielik: ni ne havas veran landan reprezentanton, kio kaŭzas, ke ni ne estas rekonataj ekz. de UEA (pri kio atestas i.a. la intervjuo kun Renato Corsetti, publikigita antaŭnelonge), kaj la statistiko de PEA pri nombro de ties membroj (800) estas falsa. Post forpelo de Tomasz el la strukturoj de PEA (dum lia ĉefredaktado de PE) li ne ĉesis aktivi kiel traduktisto, Esperanto-instruisto kaj eldonisto. Simile al multaj aliaj E-aktivuloj, ĝis nun li restas ekster la „oficialaj strukturoj” de pola E-movado, ne vidante en ĝi favorajn ŝanĝojn.

Se ni pensas pri vekigo de la movado, se ni vere zorgas pri ĝia estonto, polaj esperantistoj povus havi ŝancon demokratie elekti la estraron en rektaj balotoj, organizante venontjare landan kongreson por ĉiuj dividitaj organizaĵoj kaj „solaj” esperantistoj. Tiu kongreso estiĝu komenco de la nova, federacia strukturo de pola Esperanto-movado, kiun parto-

prenu ĉiuj agantaj nunaj organizaĵoj, societoj, ktp. Tiom pli la afero gravas kaj urĝas, ke ni poloj havas ankoraŭ ŝancon post 3 jaroj organizi la Universalan Kongreson de Esperanto.

3. Sinjorino Halina Komar, kiu lastatempe famiĝis pro sia bonega laboro en Nowy Sącz, prezentis lastajn atingojn de novsonĉa medio kiel ekzemplon de la ideo „ni fosu nian sulkon”. (Legu la koncernan artikolon de Roman Dobrzyński ene de la kuranta kajero de PE).

4. La plej kurioza por mi estis la sintento de la gvidanto (Irek), laŭ kiu dividojn en la movado kaŭzas kritikoj kaj postuloj. Oni faru sian laboron kaj ne atendu apogon de PEA, tiam ĉio iros glate. Li kaj la varsovia junularo okupiĝas pri Esperanto por bone amuziĝi, kaj en tio de longe ili sukcesas. Eĉ ili havas pli da monrimedoj ol la tuta PEA. Kvankam interesiga nek pri PEA nek pri ĝia organiza strukturo, ili pagas kotizojn por havi la „sanktan trankvilon”.

De longa tempo esperantistoj-aktivuloj, kiuj volas fondi la novan tutlandan federacian organizaĵon por instigi „unuopulojn” reveni al la movado, sanigi nunajn lamajn strukturojn kaj vekigi tutlandan aktivecon, ne havis pli oportunan eblecon esprimi siajn kaŝitajn dezirojn kaj proponojn. Tamen ili komune silentis. Al Poznań mi veturis plena de espero, ke eble paŝeton ni komune faros en la ĝusta direkto... El Poznań mi for-

kuris nokte, plenigita de malespero. Ĉu vere ununura maniero por realigi sian aktivecon pli vastskale kaj profesie estas forkuri ankaŭ de PEA kaj fondi sian propran, novan societon, kion denove kelkaj planas?

Karaj legantoj de *Pola Esperantisto*. Preskaŭ finiĝas la antaŭlasta jaro de eldonado de via revuo, kiu post 13-jara „muta” periodo renaskiĝis, danke al interkonsento de la Eldonejo HEJME kaj PEA. Fine de la venonta jaro la periodo de tiu ĉi interkonsento finiĝos, kaj nun mi ne konas rime dojn aŭguri, kio okazos poste.

Dum la ĝisnunaj kvar jaroj PE fariĝis pli kaj pli populara kaj interesa legaĵo, precipe tamen por eksterlandaj esperantistoj, de kiuj venas laŭdaj leteroj kaj dankesprimoj. „Finfine la revuo, kiu ne estas plenigita de primovadaj novaĵoj, prenitaj de Interreto” — tia opinio plejmultas. „Viaj artikoloj pri pola literaturo estas vere impresaj” — aplaŭdas la aliaj.

Certe tiu ĉi numero interesos vin ankaŭ pro sia enhavo. Mi ne reklamos specialan tekston aŭ artikolon; ĉiuj meritas esti atenteme kaj kun kompreno tralegitaj, kelkaj povas fariĝi diskuttemoj dum viaj kutimaj klubaj renkontiĝoj.

Viaj opinioj, kritikoj, kaj precipe — kontribuoj, kiel ĉiam estas de ni atentataj! Ankaŭ via reabono (aŭ ĝentila malabono!) por la venonta — ĉu la lasta? — jarkolekto.



Forpasis

William Auld

Forpasis William Auld, unu el la plej grandaj esperantistaj verkistoj de ĉiuj tempoj. Li naskiĝis la 6^{an} de novembro 1924, kaj forpasis matene la 11^{an} de septembro 2006, du monatojn antaŭ sia 82^a naskiĝtago.

Auld estis la aŭtoro de *La Infana Raso*, kiu laŭ Gaston Waringhien estas „unu el tiuj tre malmultaj originalaĵoj en nia lingvo, kiuj egaligas kun la unuarangaj produktoj de la aliaj literaturaj”. Baldur Ragnarsson opinias, ke William Auld kiel verkisto havis ĉiujn kvalitojn de grandeco: abundon, varion kaj kompetenton. „Li multe influis la evoluon de la Esperanta poezio dum la dua parto de la pasinta jarcento kaj daŭre okupas altan lokon sur nia Parnaso”, skribis Baldur Ragnarsson. Inter la verkoj de Auld estas ne nur poezio, sed ankaŭ multaj valoraj volumoj pri literaturo, lingvo kaj aliaj artoj. Lia ĉefverko, *La Infana Raso*, estis eldonita ankaŭ en la hungara, nederlanda kaj portugala lingvoj. Krome ekzistas tradukoj ankoraŭ ne eldonitaj en la angla, franca, pola (nekompleta) kaj probable aliaj lingvoj.

Esperanton William Auld lernis en 1937, en la aĝo de 13 jaroj. Tiam li estis skolto, kaj pri Esperanto li eksciis, kiam li trovis skoltajn regularojn en Esperanto. Poste li demandis al la



skoltestro pri la lingvo. Kiel respondon li ricevis lernolibron — kaj li estis perdita. Esperanton li poste persiste uzis kun siaj amikoj John Francis kaj Reto Rossetti. Pli malfrue, la kvaropo konsistanta el ili plus John Dinwoodie kaj Auld mem iĝis konata kiel la Skota skolo de la Esperanta literaturo.

En sia junaĝo William Auld partoprenis la duan mondmiliton kiel milita aviadisto, kaj la militaj spertoj evidente grave formis lian mondrigardon.

En la brita aer-armeo William Auld servis dum la jaroj 1942–46, interalie kiel piloto. Unue li estis trejnata en la tiama brita Rodezio (nuna Zimbabvo). En 1944 li gajnis, inter 50 kandidatoj, la solan pilot-lokon en spiona aviadilo de la tipo Spitfire, kaj poste li spion-pilotis kaj fotadis en ĝi ĝis la fino de la milito, en norda Afriko, Proksima kaj Meza oriento, Grekio kaj Italio. La finon de la milito li renkontis en Palestino, kaj poste li dum iom da tempo laboris kiel testpiloto de la flugarmeo.

Jam en la armeo li komencis verki en Esperanto, kaj post sia reveno al sia hejma regiono Skotlando, en 1947, li aperigis poemon tradukitan el la angla en la dua numero de la nova periodaĵo Esperanto en Skotlando. Poste li dum pluraj jaroj redaktis tiun modestan, sed historie signifan periodaĵon, kiu iĝis diskutejo de junaj verkistoj.

„Reto Rossetti vidis tiun poemon kaj tiel entuziasmiĝis, ke li venis viziti min. Li surpriziĝis, ke mi bone konas la lingvon, sed ne konas la poezion de Esperanto. Li enkondukis min al Kalocsay, Baghy, Schwartz kaj entuziasmigis min pri la Esperanta literaturo” — Auld rakontas en la verko *William Auld — 75 jaroj*.

Li debutis ankaŭ en la legenda revuo *Literatura Mondo* tuj antaŭ ol ĝi estis fermita en 1949. *Literatura Mondo* estis la plej grava literatura revuo iam ajn ekzistinta en Esperanto. Ĝi komencis aperi en 1922. La eldonado estis interrompita de la milito, sed poste la revuo aperis denove dum du jaroj.

Por la internacia publiko William Auld iĝis pli konata en 1952, post la apero de la poemaro *Kvaropo*, kie li kunlaboris kun la jam menciitaj John Dinwoodie, John Francis kaj Reto Rossetti. *Kvaropo* signis la debuton ankaŭ de la nova eldonejo Stafeto, kiun fondis Juan Régulo Pérez en La Laguna en la Kanariaj Insuloj. Tiu nova elstara eldonejo helpis ŝtopi la breĉon, kiun kaŭzis la malapero de la eldonejo de *Literatura Mondo* en Budapeŝto.

La Infana Raso laŭ multaj estas ne nur la ĉefverko de William Auld, sed eĉ la ĉefverko de la esperantlingva literaturo. Ĝi estas unu granda poemo aŭ epopeo en 12 partoj, kaj pri ĝia ekzisto ni povas danki malrapideman anglalingvan eldonejon.

„Ĝis 1950 mi ankoraŭ ne findecidis, ĉu mi verkos en Esperanto aŭ en la angla. Mi verkis la unuan kanton de *La Infana Raso* en la angla lingvo, kaj mi sendis ĝin al eldonejo. Pasis ok aŭ naŭ monatoj ĝis la respondo... Sed pro la longa nerespondo, mi decidis verki ĝin en Esperanto” — rakontis Auld en la libro *William Auld — 75 jaroj*.

Mem William Auld opiniis sia ĉefverko la tradukon de la kompleta *Maŝto de l' Ringoj* de Tolkien, kies reeldono estas planata por la jaro 2007. Aliaj gravaj tradukoj de Auld estas ekzemple *La sonetoj* kaj *Epifanio* de Shakespeare, *Aniario* de Harry Martinson (tradukita kunlabore kun Bertil Nilsson) kaj *La robajoj* de Omar Kajam.

Gravan laboron William Auld faris ankaŭ kiel membro kaj dum iom da tempo prezidanto de la Akademio, kiel redaktoro de pluraj revuoj (*Esperanto*, *Monda kulturo*, *Norda prismo*, *La brita esperantisto*, *Fonto...*) kaj dum kelkaj jaroj kiel vicprezidanto de UEA.

Sian edzinon Meta-n William Auld konis jam en la lernejo, kiam li estis 15-jara kaj ŝi 13-jara. Ili renkontiĝis denove en 1946, kiam William havis forpermeson de la armeo, enamiĝis, kaj de tiam restis kune. Ili havas unu filinon, Judit, kiu naskiĝis en 1954, kaj unu filon, Roy, kiu naskiĝis en 1956.

En 1963 la familio aĉetis domon en Dollar en Skotlando. Ĝis sia emeritiĝo William Auld laboris kiel vicestro en proksima liceo.

Dum la jardekoj de sia esperantisteco William Auld kolektis imponan bibliotekon de Esperanta literaturo, preskaŭ kvin mil volumojn. En 2001 li decidis donaci la tutan kolekton al la Skota Nacia Biblioteko. Sekve de tio la biblioteko nun havas unu el la plej gravaj kolektoj de Esperanta literaturo en la mondo.

„Ligas min al Esperanto amikeco, ĉar dum mia vivo mi akiris multoble pli da veraj amikoj per Esperanto ol per mia denaska lingvo” — Auld iam diris.

En sia recenzo pri *En barko senpilota* (kompleta originala poemaro de Auld), Mauro Nervi skribas:

Konklude, kaj pli eksplicite: William Auld estas pinto de la Esperanta literaturo, kaj unu el niaj malmultaj realismaj aŭtoroj. La unuvoluma apero de lia originala poemaro estas profetenda okazo por paŝi al „plena posedo”, ne nur de la lingvo, sed ankaŭ de pli matura — kaj ne diletanta — ideo pri poezio; en ĝi la homa ĉiutago viviĝas sub la lumo de la poeta rigardo, kaj poezio mem moviĝas en regionoj kie, laŭ tipe Aulda kontrasto, furioze fajfas la vento sub klara ĉielo.

fonto: Libera Folio

Interparolo kun William Auld

*farita de red. Barbara Pietrzak;
represo el la 1/1986 n-ro de Pola Esperantisto*

Ĉu ekzistas E-kulturo?

„La interparolo, kiun ni nun prezentas al vi estas donita de William Auld dum la aŭgsburga UK al Radio Polonia.

BP: Demandi William Auld pri kulturo estas impertinente, ja li estas unu el tiuj, kiuj kreas ĝin. Sed tute aparte mi volus demandi vin, sinjoro, pri viaj opinioj pri la Esperanto-kulturo kaj la kontribuo de la E-elsendoj de Radio Polonia al ĉi tiu kulturo.

WA: Kiam homoj parolas pri kulturo aŭ kulturoj, ili preskaŭ senescepte pensas pri naciaj kulturoj. Kompreneble Esperanto laŭdifine ne havas nacian kulturon.

Sed ekzemple estas grandaj religiaj kulturoj — estas la kristana, estas la islama kulturo, ankaŭ la socialista kulturo kaj ankoraŭ malpli grandaj. Ekzemple interne de mia lando troviĝas minimume ducent diversaj kulturoj, ĉar oni devas ankaŭ enkalkuli klason, oni devas enkalkuli edukigon. Kion mi ekzemple havas komunan — mi kiel skoto (mi estas blanka, mi estas skoto, mi estas socialisto) — kion mi havas komunan kun angla romkatolika profesoro? Tre malmulte. Kion mi havas komunan kun havenlaboristo — ankaŭ tre malmulte, relative. Do, mi opinias, ke la homoj aliĝas al iu kulturo; ekzemple nigruloj en Usono klopodas kon-

strui propran kulturon interne de la usona. Kaj laŭ mia opinio Esperanta kulturo ekzistas, ĉar la esperantistoj deziras, ke ĝi ekzistu.

Nu, ĉiu kulturo baziĝas sur plej diversaj aferoj, kompreneble. Unu el la plej gravaj estas la historio. Ni jam havas nian historion — ni estas esperantistoj, ni havas preskaŭ unu jarcenton, ne plu vivas homoj, kiuj origine parolis la lingvon. Ankaŭ estas kompreneble E-literaturo, tre forta. Kaj ni havas nian originalan E-literaturon, kiu estas unika al ni. Foje iu japana amiko venis al mia domo kaj li rigardis mian libroron kaj diris: „Kiel agrable estas viziti esperantistojn kaj vidi sur la bretoj similajn verkojn”. Tio estas nia komuna kulturo! Ni havas la gazeton. Ĉio ĉi estas bonega. Sed ni havas ankaŭ la radion. Kaj dank’ al kelkaj dediĉitaj homoj — ni ne havas nur unu stacion, ni povas fari elekton, ni povas kie ajn en la mondo aŭskulti Esperantajn elsendojn. Tio donas al ni la senton de komuneco. Foje alvenis al Varsovio sinjoro Tacuo Huĝimoto kaj Tacuo estas mia amiko kaj mi jam ne scias, ke li troviĝas en Varsovio, ĉu ne? Tiun informon mi alie ne havus. Tiaj aferoj estas ege gravaj.

Naciaj kulturoj baziĝas sur la maniero manĝi ktp, sed por mi tiu ĉi estas la distingo inter la nacia kaj internacia kulturo. La nacieco baziĝas sur tio, kio diferencigas homojn unu de la alia. Kio estas aparte skota — estas skota kulturo. Esperantista kulturo baziĝas sur tio, kio estas komuna al ĉiuj homoj, nome idealismo, la

emocioj ktp. Kaj laŭ mia opinio tiuj homaj komunaĵoj estas milfoje pli gravaj ol la supraĵaj detaloj, kiuj distingas nin unu de la alia. Tio ne signifas kompreneble, ke mi estas kontraŭ niaj naciaj kulturoj, male. Mi estas fiera skoto. Sed en mi estas du personoj, kaj mi ne vidas en tio iun malsanon. Simple, parto de mi vivas kiel skoto kaj parto de mi vivas kiel homo, kaj estas nenia karambolo inter ili. Do mallonge: kiam oni aŭskultas al radio oni ricevas la novaĵojn de sia kulturo. Feliĉe oni ankaŭ informiĝas samtempe pri aliaj kulturoj, ĉar homo, kiu vivas en la mondo volas scii, kio okazas en Pollando, kio okazas tie aŭ tie. Sed tion oni povas ankaŭ ricevi en la nacia radio, sed oni ne povas ricevi la kulturajn informojn kaj precipe por mi la kulturaj programoj estas gravaj. Ekzemple tio, ke vi dissendas poezion. En la 1961a mi ĉeestis la Universalan Kongreson, mi estis en unu ĉambro kaj mi aŭdis neklare iun muzikaĵon kaj mi diris: ho, tio estas bonega, tion mi absolute devas aŭskulti. Mi kuris al la alia ĉambro kaj mi trovis, ke oni prezentis mian „La infana raso”. Kun muziko. Kaj mi amegiĝis tion. Sed nur hazarde tion mi aŭdis. Kompreneble nun mi havas bendon. Sed tio estas parto de la kulturo, ĉu ne? Mi subite estas en mia medio kaj tio okazis nur dank’ al la Pola Radio. Do, mi verŝajne diris sufiĉe pri sufiĉe profunda temo, finfine.

BP: Jes, kaj tre lakone. Mi dankas al vi pro ĉi tiuj opinioj, ĉar nur niaj geaŭskultantoj eble pli bone povas konscii, ke ni estas ne nur perantoj ↵

↪ de informoj, sed ankaŭ peranto de Esperanto-kulturo, kiu efektive ekzistas.

WA: Certe ekzistas, certe ekzistas. Se oni diras, ke Esperanto ne havas propran kulturon, oni simple fermas la okulojn al la faktoj. Ĉar kion vi, sinjorino, kaj mi havas komunan estas io tre grava, io tre profunda kaj ni ne sentas embarason unu antaŭ la alia. Ni parolas pri la samaj aferoj, ni legas la samajn aŭtorojn. Do, tio estas la komuna kulturo”.



William Auld

La infana raso

ĉap. I

Saluton, masonisto, mia prapatro Ruben
kiu dum tuta vivo grimpadis supren-suben,
ĉizante sur preĝejoj gargojlojn kaj anĝelojn!

Kaj vin, ho posteulo de Ruben, kiu velojn
de karavelo hisis kaj sur la mar' piratis
kaj la filinon duan de tavernisto svatis
kaj lasis ŝin graveda kaj malaperis tute
sur marofundon – kara, mi kantas vin salute!
(Kaj ankaŭ vin aparte, ho tavernistfilino,
avino mia praa, al kies mola sino
sin premis tiu filo, kiu en posta vivo
dediĉis sin al rabo, al murdo kaj lascivo,
kaj dek bastardojn patris, el kiuj unu iris
milite al Polujo, kaj tie vaste viris,
al sia semofluo malfermis larĝe kluzojn,
al mi testamentante milope polajn kuzojn!)

Al vi, centmil prapatroj ŝvitintaj sub servuto,
de via tre simila pranepo jen saluto;
sed ege vin surprizus, ke li salutas ame
kiel parenco viajn jugintojn tute same.
Al vi ja ŝajnus strange, ke filo de l' kastelo
kaj via bova ido en trua sklavkitelo
per ia sortkaprico egale kontribuas
al tiu sango, kiu en miaj vejnoj fluas.

(Verdire, la surprizo ne estus via sole:
eĉ pli la kastelfilo min gapus senparole!)
Kaj ankaŭ vin, praavaj kaj vilaj sovaĝuloj
kiuj rezistis venke per glavoj kaj ŝtonruloj
invadajn legianojn de roma Agrikolo –
mi vin salutas: Ave!

Jes, tuta ĉi popolo
(aŭ preskaŭ) min generis, laŭ pruvo de ciferoj
montrantaj, ke la sumo de miaj avaj eroj
en tiu tempo estis kelkoble jam pli granda
ol eĉ la tuta sumo de l' loĝantaro landa!
Sed ankau en la vicoj atakaj de l' legio
troviĝis pli ol unu patro de mia mio,
kaj kiam glav-al-gorĝe mortluktis murdocele
barbaro kaj romia soldato, jen duele
du homoj reciproke malamamis, kies semo
kuniĝis post jarcentoj en mia sola memo.
Per dura bato unu breĉas l' alies flankon:
doninto de mia sango fluigas mian sangon...

Kaj sen entuziasmo, jen do parenca mano
al vi, prapatro morna, malrida puritano;
jen dorsobat' amika al vi, aktor' ebria,
kies boheman viglon heredis koro mia;
jen kis' al vi, Maria, kiu la pajlon faskis;
mi, vin brakumas, Liza, kiu infanon naskis
sed pri la patronomo neniam estis certa:
pri ama kaj kuira artoj vi estis lerta.
Kaj vin, tajlor-prapatro, salutas mi solene,
kaj vin...

kaj vin...
vin ankaŭ...

sed jam la menso svene
rifuzas eĉ koncepti individuajn erojn
de l' disradia ĉeno, gravedojn kaj generojn
kiuj en mi kulminas kaj faras min parenco
en malproksima grado de ĉiu ekscelenco,
de ĉiu almozulo, putino kaj doktoro
de mia land' kaj via, trans lingvo kaj memoro...

Saluton, frato, kiu kolportas sur la stratoj --
nin ia malproksima orgasmo faris fratoj!
Kaj vi, juĝist' severa -- saluton do, amiko!
Nin ambaŭ kreis iam la sama ingvenotiko!
Venu en miajn brakojn frate, nigrulo-plebo:
disigis nin praprae duiĝo de amebo,
kaj vi Jesuo Kristo, el lando brule suna,
vi estas mia frato malgraŭ la haŭto bruna
kiun adeptoj viaj miscele kalkas blanka:
antaŭnelonge nia prapatro estis blanka!

Timige amasiĝas patrar' senintermita,
multobligante sin laŭ kvadrato infinita
en la paseon retro, senbreĉa vivoĉeno,
maldika, forta, obstina, fragila vivfadeno,
kiu ekdisvolviĝis kiam kun elemento
kuniĝis elemento pro kosma akcidento
kaj la unua flagro de vivo ekaperis --
ho, tiu nekonebla momento MIN generis!
Sed se en iu blinda horo mi min ekzaltas,
mia patraro flustras: ĉe vi la temp' ne haltas!
Ne vi, kulmina punkto de nia blinda iro;
post vi tre longe pluen impetos la spaliro;
de nia praamebo ĝis vi -- sekundopaso!:
apenaŭ vojkomence sin trovas nia raso.
Vi estas nur spireto de bebo novnaskita:
vi venis, iros, ero en ĉen' senintermita!
Saluton, antaŭuloj, jam pasis via horo ...
Kuraĝon, homofratoj de ĉiu haŭtkoloro --
la tempmiraĝo, kiu disigis nin damninde,
nin fine rekunigos!

Kaj dume, palpe, blinde,
ni venas, iras, eroj en ĉeno kies finon
ne formas ni nek vidos. Kuraĝon kaj obstinon!

(1936)

*Kiĉo de malfervora esperantisto**

Ĉu esperantistoj estas normalaj homoj?
Ne, esperantistoj ne estas normalaj homoj.

Anatolo Gonĉarov. El prelegoj.

Mesioj aŭ ĝuuloj

Hazarda vizitanto de Esperanto-aranĝo ĉiam spektas bildon, nekutiman por rigardo de filistro: grupetoj de ne nur junaj seriozaj, gajaj, brilkulaj homoj, evidente obseditaj de io. Eble de dio? Aŭ de demonoj? Tuj troviĝos volontulo, ne nepre verda policisto, kiu klarigos al la profano, ke la ĉeestantoj nur strebas feliĉigi la homaron per universala interkomprenilo, kaj la konscio de propra modesta kontribuo al ĉi tiu historia misio aldonas specialan valoron al iliaj aspekto kaj pensmaniero. Sed se la vizitanto volas kaj kapablas analizi, li rapide trovos, ke inter esperantistoj troviĝas reprezentantoj de diversaj soci-psikologiaj tavoloj. La ideo, ke esperantistoj apartenas al specialaj naturaj psikologiaj tipoj, estas ne pli ol mito. Mi mem testis. Certe esperantistoj plejparte estas scivolemaj, fervoraj, klerigitaj, celstrebaĵaj, spritaj, menskapablaj k.t.p. (*el la diskutlisto <alt.talk.esperanto>*).

* La supra teksto, datita 2005-05-10, aperis originale en REGO (Rusia Esperanto-Gazeto). La tutan tekston ni publikigas laŭ la permeso de la ĉefredaktoro, Garik Kokolija.

Tamen la menciitaj kvalitoj ne sufiĉas por „mesia sindromo” (malgraŭ ke tiaspeculoj ne mankas).

Ĉar mi, kiel ordinara esperantisto, estas scivolema, mi provis solvi la problemon per kompara metodo. Mi vizitis kelkajn sektojn, kies adeptoj same strebas feliĉigi la homaron. Kaj mi trovis, ke se la sekto ne estas totalisma, do plejmulto de la adeptoj, verŝajne krom la gvidantoj, tute ne estas obsedita de mesiismo. Ili vizitas la sekton por tie simple ĝui. Ekzemple la budhanoj certe kredas, ke la sorto donacis al ili la Veron, antaŭ kiu ombriĝas ĉiuj ceteraj atingoj de la homaraj scienco kaj kulturo. Sed ĉiuvespere ili vizitadas ceremonion de meditado ĉefe pro la kaŭzo, ke ĝi liveras primitivan kaj sufiĉe krudan fizikan ĝuon. Nu, la homoj ne volas sin limigi per banala maniero kaj aplikas ion alternativan. Ĉe kristanoj okazas la samo, sed sur „pli alta”, spirita nivelo: ili akiras tiel nomatan „gracon”.

Kian gracon akiras esperantistoj?

Ĉiu esperantisto povas konjekti, ke por „samideanoj” nia kara lingvo estas ne nur interkomprenilo. Simpla

pruvaĵo: Esperanton konstante uzas por komuniki inter si posedantoj de la sama gepatra lingvo. Kontraŭargumentoj pri lingva praktiko ne validas: Esperante parolas inter si ege spertaj samlingvaj esperantistoj. Pro kio? Sola respondo: ili amas Esperanton. Tamen pro kia graco?

La respondoj povas esti diversaj. Ekzemple:

1. Esperanto estas belsoneca. Nu, imagu du rusajn filologojn, interparolantajn itale aŭ ĉine pro la belsoneco. Frenezaĵo...

2. Esperanto estas logika, liber esprimiva k.t.p. Tio aspektas pli racie. „Ĝi estas la plej viva lingvo el ĉiuj vivantaj... Probable ceteraj lingvoj nomindas mortaj, ĉar ilia gramatiko estas limigita per rigidaj kadroj: tiel ne parolendas, tiel oni ne parolas... Esperante vi povas ĉion esprimi eĉ uzante malgrandan vortprovizion, kaj estos komprenata. Tio estas vera kreado ebliganta kombini kaj novelstigi”. **Andrej Korobejnikov** <www.rg-rb.de/2004/40/bw_1.shtml>. Teorie tio aspektas jene: „Esperanto integriĝas en la homa psiko je nivelo pli profunda ol ĉiu ajn alia fremda lingvo. Ne tuj, ne ĉe komencanto, sed ĉe tiu, kiun Janton nomas „matura esperantisto”, homo kun sufiĉa sperto pri la lingvo por senti sin hejme en ĝi. Kial ĝi situas pli profunde en la psiko? Ĉar ĝi, pli ol iu ajn alia homa lingvo, sekvas la naturan movon de la cerbo ĉe homo, kiu volas esprimi sin... Ĉio ĉi, kaj ankaŭ la eblo krei vortojn laŭvole, kion oni ne rajtas fari en multaj lingvoj, kreas etoson de libereco, kiu lo-

kas la lingvon en pli profunda tavolo de la psiko, pli proksime al ties kerno, al ties instinkta bazo. Estas pli facile esti spontana en Esperanto ol en la franca, ekzemple, ĉar oni devas observi malpli da arbitraj malpermesoj. En ĝi do oni sentas sin pli facile. Pro tiaj trajtoj Esperanto fiksiĝas pli profunde en la psiko ol la aliaj fremdaj lingvoj, kaj pro tio oni multe pli emas identiĝi al ĝi”. **Claude Piron. Psikologiaj aspektoj de la monda lingvoproblemo kaj de esperanto** <[ftp://members.aol.com/sylvanz/pirprel.htm](http://members.aol.com/sylvanz/pirprel.htm)>.

Limigoj povas esti ne nur gramatikaj aŭ stilaj. Psikaj limigoj formiĝas en la infaneco lige kun kondiĉaj ekscitiloj, kies rolon ofte ludas vortoj, vortesprimoj, gramatikaj konstruaĵoj de la gepatra lingvo, kiuj samtempe kun negativa motivado povas formi t.n. minuskompleksojn aŭ malakcelojn. Dezirantoj legu: **Anatolo Gonĉarov. La lango ne turniĝas dirition ruse**. Literatura Foiro, 166 (apr. 1997), p. 93-94 <www.anatolog.narod.ru>. Persono, kiu posedas grandan ŝarĝon de minuskompleksoj, iĝas neŭrozulo. Ekposedinte fremdan lingvon neŭrozuloj liberiĝas de minuskompleksoj. Kial neŭrozuloj abundas en Esperantujo? Ĉar Esperanto estas unika fremda lingvo, kiun neŭrozulo povas ekposedi rapide, libere kaj spontane. Des pli ke por regi etnan lingvon endas multe legi, dum neŭrozulo kapablas korekte paroli limigitan Esperanton leginte nur lernolibron. Kia ŝparo de mensa energio! Peli neŭrozulojn el Esperantujo estas same, kiel peli ftizulojn el Kri-

meo. Des pli ke: „Al tiuj neŭrozuloj, al tiuj homoj, kiujn psikaj problemoj kripligis, ni havas grandegan ŝuldon, ĉar sen ili la lingvo simple formortus. Estas naive kaj maljuste rigardi ilin de alte, kiel emas fari kelkaj advokatoj de la Raŭma Manifesto. En la historiaj cirkonstancoj, en kiuj ili troviĝis, tiuj iom sektecaj verdsteluloj necesis, por ke la lingvo disvolviĝu. Normaluloj ne povis interesiĝi pri Esperanto, uzi ĝin kaj do vivteni ĝin. Se Esperanto ne estus konstante uzata, se neniu verkus en ĝi, se ĝi ne utilis en korespondado, kunvenoj, eĉ konsistantaj ĉefe el stranguloj, ĝi ne povus disvolvi sian lingvan kaj literaturan potencialon, ĝi ne povus riĉiĝi, ĝi ne povus iom post iom konduki al pli profunda analizo de la monda lingvoproblemo”. **Claude Piron**, ant. cit. Ni povas rememori plurajn esperantistojn, suferintajn pro balbutismo ruse, kiuj parolis Esperante flue dum multaj jaroj.

Revolucio aŭ stagnado?

La tipa rusa demando „kion fari”: uzi Esperanton kiel psikoterapian rimedon, kio donas tuŝeban rezulton kaj pravigas nian eksterhobian ekzistadon, aŭ ekzerci en retorikaĵo pri la historia rolo de la internacia lingvo por popola interkomunikado. Laŭ kalkuloj de sociolingvistoj, por ke la lingvo kapablu ludi ĉi tiun rolon en la nuna socio, ĝi devas havi 50.000.000 da aktivaj uzantoj. Mankas proksimume 49.900.000. Sed en favoraj kondiĉoj la specikvanto kreskas eksponente. A.J. Toynbee (**A Study of History**) asertis, ke la favoraj

kondiĉoj por internacia lingvo („*lingua franca*”) estiĝas en epoko de socia disiĝo, dum milito aŭ ĉe komerca traktado. Ĉu Esperanto estas lingvo de milito? Ĉuste dum la postrevolucia Civitana milito en Rusio Esperanto ricevis vastan ŝtatan subtenon kaj disvastigon. Same en Ĉinio. Sed tio okazis pro ideologiaj kaŭzoj. Poste la situacio ŝanĝiĝis. Esperanto estas hobbio de homoj menspotencaj sed nerealigintaj, kiuj multiĝas dum stabilaj periodoj de stagnado kaj socia malmobileco. En Rusio ni observas komencon de tia periodo. Kaj kreskon de intereso al Esperanto. Post apero de la televida filmo pri Kazaroza la kresko fariĝos eksplodo. Kiu pretas? Ŝajnas ke pretas nemultaj. Do Esperanto dum ankoraŭ longa tempo devas ĝui ĉarmojn de stagnado kaj servi rifuĝejo por tiuj stranguloj, kiuj inklinas dependi de ĝia fascino. Normale. Verku ni versojn.

Esperanto estas lingvo de poetoj?

Kompetentuloj scias, ke versfardo en Esperanto pli facilas, ol en etna lingvo, eventuale krom la malnova ĉina. Vespere ĉininoj varmigis teujon da vino, dronigis penikojn en tuĉon, desegnadis ideogramojn kaj ĝuis kontemplantante harmoniajn ritmojn de iliaj elementoj — soneco, ritmoj kaj ceteraj bagatelajoj ne gravis. Tio estis ina okupo. Viroj (krom profesiaj instruistoj) okupiĝis pri tio precipe prepariĝante al ekzameno por okupi ŝtatan postenon. Ĉiu estro devis fari versojn. Feliĉuloj...

En Esperantujo ni observas si-

milan bildon: ne nur la elito fervore plektas versojn. Tamen belsoneco, rimoj kaj ceteraj bagatelajoj plej gravas. Ĉar mankas ideogramoj. Kaj teujo. Ĉu al Esperantujo venas poetoj, kiuj estas ĝenataj por verki nacilingve? Kiu estas poeto? Demandu ni poeton. „*Homo ekverkas verson pro diversaj motivoj... Sed sendepende de motivoj, pro kiuj li ekprenas plumon... tuja rezulto de ĉi tiu ago estas la sento de rekta kontakto kun la lingvo, pli precize — la sento de tuja ekdependeco de ĝi, de ĉio, kio en ĝi jam estas eldirita, skribita, estigita... Poeto estas ekzistorimedo de la lingvo... Verkanto de verso verkas ĝin unue pro tio, ke la verso estas kolosa akcelilo de la konscio, pensado, mondpercepto. Spertinte tiun akceladon unufoje, la homo jam ne povas rezigni ripetadon de tiu ĉi sperto. Li ekdependas de tiu ĉi procezo, kiel oni ekdependas pro narkotaĵoj aŭ alkoholo. Homo, tiel dependanta de la lingvo, mi opinias, nomiĝas poeto*”. **Iosif Brodskij. Nobela prelego** <<http://lib.ru/BRODSKIJ/lect.txt>>. R.Kipling antaŭe esprimis mote: „*Vortoj estas certe la plej potenca narkotaĵo uzata de la homaro*”. **Rudyard Kipling. A Book of Words. XXIII. Surgeons and the Soul** <<http://whitewolf.newcastle.edu.au/words/authors/K/KiplingRudyard/prose/BookOfWords/surgeonssoul.html>>. La esperantologia scienco ankoraŭ ne difinis, kiujn substancojn produktas esperantistoj dum versplektado. Certe ne nur galon. Finfine ni esperu, ke Esperanto-dependaj poetoj feliĉigos la homaron, aplikante Esperanton

kiel rimedon por substitua terapio de narkotismo anstataŭ metadono.

For la kondiĉecon!

En esperantologia literaturo eblas legi multajn receptojn, kiel indas admoni kontraŭesperantistojn pri senkomparaj avantaĝoj de la internacia lingvo. Leginto de la libro far **A.S. Melnikov „Lingvokulturologiaj aspektoj de internaciaj planlingvoj...”** (nur paragrafo 1.2) devas tuj fariĝi sinsekva adepto de la interna ideo. Ĉio estas racie pruvita, tamen malĉiuj fariĝas... La afero konsistas en tio, ke ĉio estas pruvita racie. La tuta libro estas verkita per unu cerba duonsfero — la maldekstra, kiel ja devas esti verkita scienca libro, des pli diserta. Sed la maldekstra duonsfero nur plenumas, dum regas la dekstra, malracia. Ni povas ĝin forŝalti kaj ignori ĝiajn majstrojn, bone ili nin forgesis, iluziante, ke Esperanto formortis. Ilin ĝenerale movas iluzioj, tio estas ilia pensmaniero. Pri tio diru ni poste. Sed Esperanto vivas kaj reviviĝas. Se ili nin denove rimarkos, ni devos minimume ilin konsideri.

Ĉu povas ekzisti arto en Esperanto? Kompreneble jes, diros esperantisto. Kontraŭesperantisto pensas alimaniere per sia dekstra duonsfero: „*[La arto] estas nek intelekta ludo, nek mensa triko. Logikoluda pensado por ĝi estas kontraŭindikita... Dieca ingredienco de la arto, mem ĝia fenomeno — aperanta impresado de ‘dikta-teco’ kaj diinspireco — ĉeestas nur ĉe certaj kondiĉoj, nepraj limigoj kaj nevidentaj reguloj... [La arto] ne estas*

ludo, sed lingvo, kiu malgraŭ sia moderneco memoras multmiljaran historion... Al la arto, same kiel al la lingvo, nedeklarite imanentas kondiĉecoj kaj limigoj. Sed la lingvo diferencas de la ludo tiel, ke ĝi estas primara kaj memsufiĉa; ĝiaj reguloj eliĝas de ĝi mem, fariĝas de ĝia materialo, ne estas truditaj de ekstere... Inventita lingvo estas certe ne lingvo, sed ludo... Mi ege kompatas homojn — se tiaj certe ekzistas, kiuj pensas kaj sentas en Esperanto... Vidpunkte de la arto kiel lingvo, uzado de reguloj de ludaj 'lingvoj' estas primitiva fuŝado de la internaj kondiĉecoj de la arto. En la primitiva fuŝado estas nenio bona. Des pli ĝi estas hontinda...”, k.t.p., k.t.p. — **Aleksej Purin, Rememoroj pri Eŭterpa**. Literatura almanako, vol. 9, SPb.: revuo „Zvezda”, 1996.

Unue ni konstatas, ke la esperantisto A. Melnikov (liaj ideoj ne bezonas citadon) kaj la kontraŭesperantisto A. Purin apenaŭ povus interkonsenti, restante kun siaj konceptoj, ja la konceptoj estas ridinde oponaj.

Due ni vidas, ke la oponantaj argumentoj baziĝas sur la ideo de kondiĉeco. Ĝi venis, verŝajne, de Nietzsche kun lia kulturologia diĥotomio inter Apolono kaj Bakĥo. „Apolono kiel dio de ĉiuj fortoj, kreantaj per bildoj, estas samgrade dio, proklamanta la veron, aŭguranta la futuron... en kies gestoj kaj rigardoj kun ni parolas la tuta granda ĝojo kaj saĝo de la 'iluzio' kun ĝia beleco... Bakĥo simbolas teruron kaj raron, 'teruran raron' de homo, dubinta en formoj de fenomenekkono, kaj 'beata ravo, levanta el sino de homo kaj eĉ

naturu', kiam estas rompita la principo de individueco, ĉiuj senmovaj kaj malamikaj limoj, starigitaj inter homoj per la mizero, arbitro kaj 'aroga modo'... Ĉiu sin sentas ne nur unuiginta, paciĝinta, solidariĝinta kun sia proksimulo, sed integra kun li”. Cit. laŭ **Kulturologio: Lernolibro por stud. de tekn. altlernejoj** (red. N.G. Bagdasarjan). — M.: „Viŝaja ŝkola”, 1999. Certe ni apenaŭ oponus, ke „Bakanalo en Esperanto estas pasiiĝa aĵo”. **Vjaĉeslav Sokolov**. Kovrovskije vesti, № 84, 20.04.2004 <<http://kovrov.lgg.ru/media/Vesti/archives/kv20-07-04.shtml>>. Same ni agnosku, ke Esperanto apenaŭ travivus 118 jarojn, se ĝi nur rompus „obstinajn barojn” inter popoloj, ne en kapoj de individuoj.

Similan provon okazigis hipioj en la 1960^{aj} jaroj. Ili fiaskis pro du kialoj. Unue ili plilarĝigis nur propran konscion. Due ili uzis LAD-on anstataŭ Esperanto. Certe Esperanto elvokas halucinojn ne ĉe ĉiuj homoj (se ni kredu al partoprenantoj de REU-retlistoj, tio iam okazas), tamen ne detruas, sed plibonigas la sanon. Do, pro la dua kialo Esperanto ne povas fiaski, nur pro la unua. Se esperantistoj ne sukcesos trati la „obstinan baron” inter ili kaj la ekstera mondo, nur restas por ni kun Lenina pasio proklami: jes, ni estas lingvaj narokotuloj, jes, ni estas intelektaj hipioj, jes, ni estas maldekstraj duonsferuloj, kaj ni fieras pro tio!

Alivoje ni devas kaj espereble povas apliki Esperanton por tio, por kio ĝi estis kreita — por la pacbatalo. Pena laboro, sed fruktodona. ❀

Ĕŭropa identeco en la pola DAVOS

La fonto

Krunico estas ĉarma sudpollanda kuraĉloko en la Beskid-montaro, precize en tiu ĝia parto, kies ĉefurbo estas Novsonĉo, pole Nowy Sącz. La urbo spite sian nomon tute ne

estas nova, ĝi ekzistas ok jarcentojn kaj famas pro valoraj monumentoj kaj multfaceta aktiveco de siaj loĝantoj. En la jaro 1992, kiam por Pollando malfermiĝis la ŝanco aliĝi al Eŭropa Unio, ĝuste en Novsonĉo naskiĝis la ideo establi forumon de sendependa diskutado pri aferoj de la centra kaj orienta

Eŭropo. La lanĉinto de la ideo, parlamentano Zenon Berdychowski emfazis la devon de Pollando konservi siajn rilatojn kun la orientaj najbaroj, por eviti aliforman dividon de la kontinento. La pola nomo de la kuraĉloko, Krynica, signifas fonto, ĝi estas ankaŭ fonto de ideoj.

La ideon kaj la nomon de la Ekonomia Forumo en Krunico sendube inspiris la Monda Ekonomia Forumo en Davos kaj ĝi baldaŭ famiĝis kiel la

„pola Davos”. Unue ĝi altiradis elitojn de la centra kaj orienta Eŭropo, sekve influovajn personojn el la tuta mondo. Ĉijare ĝi okazis jam la 16^{an} fojon. El 40 landoj venis 1300 personoj, reprezentantoj de la ekonomia,

socia, kultura kaj politika vivo, inkluzive pluraj eksaj prezidentoj, ministroj kaj aktualaj ĉefministroj de Pollando kaj Ukrainio. En tiu elita societo la unuan fojon eklumis la verda stelo.

La forumo

En Novsonĉo aktivas grupo de esperantistinoj, kiun komandas Halina Komar.

Pasintjare ili sukcesis enkonduki Esperanton en la studprogramon de la loka Uiniversitato de Tria Aĝo. Mi havis la plezuron kontribui al tiu sukceso, sed tute ne imagis, ke la triaagaj studentinoj de Esperanto evidentiĝos la plej aktiva grupo de la tuta universitato. Tiu socia altlernejo, en kiu ĉefe studas pensuloj, ĝuas prestiĝon en la urbo interalie dank’ al ĝia dinamika direktorino Wiesława Borczyk. Ĝuste ŝi aranĝis

En Krunico oni ankoraŭ vestas kravatojn, dum en Davos ili estas malpermesitaj. Ne nur per tio la Monda Ekonomia Forumo en Svislando kaj la Ekonomia Forumo en Pollando diferencas unu de la alia, tamen ili ambaŭ ĉiam pli servas la saman celon, konstrui favoran klimaton de la politika, ekonomia kaj kultura kunlaboro en la mondo.

al la universitato la rajton partopreni la forumon en Krinico kaj la esperantista grupo proponis temon, kiu evidentiĝis bonvena: **Lingva politiko — kia modelo por Eŭropo?**

La propono perfekte enskribiĝis en la ĝeneralan temon de la ĉijara forumo: **Eŭropaj defioj — demandoj pri nova identeco de Eŭropo.** Lingva politiko akceptita kiel temo de unu el panelaj diskutoj en la prestiĝa internacia aranĝo estis ne sola sukceso de la esperantistoj. La alia estis tio, ke por ili estis rezervitaj en la forumo ok oficialaj akreditoj. Necesis urĝe selekti okpersonan teamon por la panelo. Helpante Halina Komar en tiu tasko ni ĝoje konstatis, ke ne mankas en Pollando esperantistoj kompetentaj por tiu rolo. La ĉefrolanto nature devis esti s-ino Margareta Handzlik, deputito de la Eŭropa Parlamento. Invitojn al la aliaj tri panelanoj estis senditaj eksterlanden nome al Barbara Despinay (Francio), Zlatko Tišljar (Slovenio) kaj Peter Baláž (Slovakio).

La paneldiskuto okazis la 8^{an} de septembro 2006. Je la 13:30 la salono en la akvotrinkejo estis plenplena, kolektiĝis proksimume 60 personoj. La aranĝo de la diskuto estis perfekta



laŭ la organiza kaj teknika vidpunktoj. Nenio mirinda, la forumo en Krinico havas jam 16-jaran tradicion. Funkciis interpretkabinaj por tri lingvoj, nome la pola, angla kaj rusa. Kaj jam en tiu fakto estis videbla grava problemo de Eŭropo. Suferis ĝin Zlatko Tišljar. Sciopovante kelkajn eŭropajn lingvojn, li devis legi sian referaĵon en la angla, kiun li ne parolas.

La panelo

Margareta Handzlik gvidis la diskuton kaj ankaŭ mem kontribuis al ĝi per sia brila prezento de la lingva problemo en la Eŭropa Parlamento. Helpate de videoilustraĵoj ŝi demonstris komplikitan reton de la reciprokaj tradukpadoj inter la 21 lingvoj de la Eŭropuniaj landoj, kaj ties financajn implicojn kalkuleblajn en miliardoj da eŭroj. La parlamentanino atentigis pri drasta malobservado de la fundamenta principo de la Eŭropa unuiĝo, nome la samrajteco de ĉiuj lingvoj. Konklude ŝi prezentis avantaĝojn laŭ la jura, ekonomia kaj morala vidpunktoj, kiuj rezultus el akcepto de unu, neŭtrala pontolingvo.

Barbara Despinay, doktoro pri ekonomio, reprezentanta la Nacian Centron de Sciencaj Esploroj ĉe la fama Sorbono preparolis rilaton inter la kultura identiĝo en regionoj kaj ĝia ekonomia evoluo. Rezulte de siaj esploroj en minoritataj regionoj, ŝi konstatis des pli efikan ekonomian evoluon, ju pli forte identiĝas kun koncerna regiono ĝiaj loĝantoj.

Zlatko Tišljar, elstara teoriulo pri la temo „Eŭropa identeco”, kaj se-

kretario de Eŭropa Esperanto-Unio difinis diversajn aspektojn de la nocio „identeco”, pledis por sistema tiudirekta edukado, kiel nepra kondiĉo de sukcesa unuiĝo de la kontinento. La preleganto, kiu mem konsideras sin kroato, sloveno kaj Eŭropano samtempe emfazis la alian kondiĉon por konstrui komunan Eŭropan indentecon, nome komunan lingvon, kiu garantius al eŭropanoj reciproke rilatiĝi surbaze de la lingva egaleco.

La kvara panelisto, Peter Baláž, junulo el Slovakio, interalie reprezentanto de TEJO, prezentis mallongan informfilmon pri Esperanto, aranĝitan en 25 lingvoj, eksponantan la ĉefajn „virtojn” de la lingvo internacia, ĝian neŭtralecon, facilecon, amikecon, toleremon, pacon.

La diskuto

Post la eldiroj de la „panelistoj” komenciĝis ĝenerala diskuto, kiun ardigis elpaŝo de brito, konsideranta la lingvan problemon en la mondo solvita per la angla. Li kontraŭstaris Esperanton, kiel senkultura lingvo. Krome la brito konstatis, ke instruante al homoj lingvon internacian, oni malebligas al ili ĝui legadon de Ŝekspiro en originalo.

Tuj levigis demando, ĉu averaĝa brito entute facile komprenas la lingvaĵon de antaŭ kelkaj jarcentoj. D-ro Ilona Koutny, hungarino, kiu gvidas Interlingvistikan Studumon en la Universitato de Poznano, konsciigis al la brito, ke Esperanto estas lingvo, kiu absorbis la ĉefajn verkojn de la monda literaturo, kaj en kiu kreiĝas origi-



nala literaturo. Tiel valora literaturo, aldonis d-ro Zbigniew Galor el la universitato en Poznano, ke brito William Auld estis nomita kandidato al Nobelpremio.

D-ro Witold Stepniewski, vicrektoro de la Teknika Universitato en Lublino starigis la ŝajne simplan, sed tamen malfacilan demandon: Kion signifas la nocio „lingvokono”. Li aludis katastrofajn rezultojn de ĉijaraj matureceksamenoj pri la pola lingvo. Jen la 19-jaraj gejunuloj fiaskas pro la gepatra lingvo, kiun ili parolas ekde la infaneco, kiel 7-jaruloj komencis lerni la lingvon en lernejo kaj post 12 jaroj de lernado tamen ne konas ĝin sufiĉe. Kiel do mezuri la konon de fremda lingvo? Kian ŝancon havas ne-brito, kiu kuraĝas konkurenci je posteno en Eŭropunia instanco



kontraŭ denaska brito? Kaj kio estas „lingvokono” laŭ aŭtoroj deflugfolioj, en kiuj oni promesas instrui la anglan dum tri monatoj?

La subskribinto de tiu ĉi artikolo ankaŭ kontribuis al la diskuto pri la sama temo, rakontante pri sia sperto dum la instruado de Esperanto en la Pekina Universitato. Ĉiuj miaj studentoj lernas jam ok jarojn la anglan lingvon kaj neniu ĝin parolas, dum post tri monata lernado de la lingvo internacia kelkaj personoj ekparolis Esperante. El la publiko estis aludita „La Zamenhof-strato”. Oni trovis ĝin libro, kiu pruvas la valoron de Esperanto kiel literatura pontolingvo. Kun plezuro mi povis anonci, ke tri jarojn post ĝia publikigo en Esperanto, ĝi jam atingis dek eldonojn en diversaj lingvoj, krome ses tradukoj jam estas pretaj por eldono, kontinuas tradukado en kvin aliaj lingvoj kaj venas novaj tradukproponoj.

Konkludoj

En Krinico la esperantistoj sukcesis prezenti la lingvan problemon en Eŭropo al neesperantista publiko en ĝia influropa, elita nivelo. Estis uzitaj tri diversaj manieroj. Eble la plej grava estis la paneldiskuto, sed ne malpli gravas, ke ĝi lasis firman spuron en la oficialaj dokumentoj. La kvar panelanoj estis prezentitaj per siaj portretoj kaj funkcioj en la bela albumo de la aktivaj partoprenantoj kaj en la programlibro estas esence preparolita la temo de la paneldiskuto pri la lingva politiko en Eŭropo.

La tria maniero de la esperantista partopreno estis la informa stando pri Esperanto. Ĝi estis organizita kaj priservata de Pola Esperanto-Junularo, kiun reprezentis en Krinico Anna Stachowicz el „Varsovia Vento” kaj Leszek Dobrowolski el „E-Senco”, funkcia en la Universitato de Adam Mickiewicz en Poznano. Tiel okazis la malofta en nia movado intergeneracia kunlaboro, la triaaguloj kaj la gejunuloj man-en-mane agis por la sama celo.

La vera heroino de la tuta afero estas Halina Komar, kiu iniciatis la enkondukon de Esperanto en la Ekonomian Forum de Krinico kaj faris multmonatan laboron, plenan de malfacilaĵoj kaj surprizoj. Ŝi havis stabon de sindonemaj kunlaborantoj, kiel Danuta Kowalska, Jolanta Kieres kaj aliaj. Ili ne nur faris la organizan laboron, sed ankaŭ gastigis la alvenintajn esperantistojn. Ili loĝis ĉe Halina Komar mem, sed ankaŭ ĉe Stanisława Zaczyk, Krystyna Kulej-Dulak kaj Krystyna Stendera.

La lingva panelo de la 16^a Ekonomia Forumo en Krinico estis unu el la cento da diverstemaj diskutoj, tamen ĝi estis unusola, kiun organizis nek iu ŝtata instanco, nek riĉa entrepreno aŭ organizaĵo, sed grupo de entuziasmoj, kapablaj trovi sian bazon en la Socia Universitato de Tria Aĝo kaj engaĝi por sia projekto kompetentajn esperantistojn el Pollando kaj Eŭropo.

Jen la Novsonĉa fenomeno!

Ĉu kadre de „Pola Esperantisto” lokaj esperantistoj ne volus prezenti sian E-komunumon? Certe jes!

Bjalistokan E-Societon kreis Jakubo Ŝapiro en la jaro 1920 aŭ 1922. Post la 2a mondmilito polaj esperantistoj agis nur pere de PEA kaj bjalistokanoj decidis revivigi la lokan Societon nur en la jaro 1991. Nia decido, malakceptata komence per „oficiala E-mondo”, okazis trafa laŭ nia vidpunkto. Kreado en Bjalistoko (1996) de la Informacia kaj Kultura Centro je la nomo de Ludoviko Zamenhof ĉe la strato Piękna 3 donis al ni esperon havi senpagan lokon por kunvenoj, sed fakte tio ne okazis. La Centro servis nur por turistoj kaj ni daŭre renkontiĝadis en hazardaj lokoj. Ne miru kara leganto, ke ni ekĝojis eksciante, ke pro fincaj kaŭzoj post mallonga tempo la Centro falis. Bjalistoka E-Societo tuj subskribis kun la posedanto — Fondaĵo Zamenhof — la interkonsenton pri la komuna uzado de la sidejo. Ni kovras ĉiujn necesajn elspezojn, kiuj dank’ al laboro de volontuloj ne okazis tro altaj. Nun venis la demando — kion fari por ligi esperantistojn kun la klubo? Laŭ mia observo klubon bezonas precipe esperantistoj, kiuj ne parolas flue Esperanton kaj amikoj de Esperanto, kiuj pro diversaj kaŭzoj neniam ellernos Esperanton. Ili malofte partoprenas mondajn E-arangojn pro manko da lingvoscio aŭ mono. Do — fakte tiuj, kiuj estas la plej nombraj en

Esperantujo. En multaj urboj ekzistas flueparolataj esperantistoj kiuj mem kontaktas E-mondon kaj preferas ekz. Interreton anstataŭ kluban vivon. Ankaŭ en Bjalistoko estas kelkaj „veraj samideanoj”, kiuj prezentas sin 1- aŭ 2-foje en la jaro antaŭ eksterlanda publiko. Aliaj venadas la klubon. Se la estraro oferas al ili prelegojn kaj seriozajn diskutojn ekz. pri la kialoj de malforto de Esperanto–Movado — ili plu ne revenus. Do — ni kreis normalan E-familion kun 55 „E-familianoj kun statistikaj homaj mankoj kaj avantaĵoj”. En nia klubo la plej vigla estas sekcio de briĝludantoj — ĉ. 20 personoj. Ili ĉiuj jam estas pensiuloj kaj renkontiĝas dufoje en la semajno po ludi briĝon. Preskaŭ ĉiuj vivas solaj, ĉar la gepartneroj mortis. Preskaŭ ĉiuj pasis la bazan kurson de Esperanto sed ili ne scipovis perfekte ellerni la lingvon — ili balbutas. Fakte ili estas geamikoj de Esperanto, sed dank’ al ili en la klubo estas pure, kaj en la necesejo ĉiam estas rulaĵo de tualetpapero. Se venas gastoj kadre de PASPORTA SERVO aŭ aliaj — mi ĉiam povas kalkuli je la kunlaboro de briĝludantoj.

La dua grupo estas vojaĝemuloj. Ĉiujare ni finas junie la 6-monatan bazan kurson de Esperanto kaj donadas al ekzamenitoj ŝancon partopre-

ni malmultekostan, kluban, eksterlandan vojaĝojn por kontroli mem, kion ili ellernis dum la kurso. Ni partoprenis komune BET-ojn en Tallino, Rigo, Kaŭno, Birŝtonas, Aroman Jalton en Krimeo, someran tendaron en Lančov (Ĉeĥio), vizitis E-klubojn en Erlangen kaj Nurnbergo (Germanio) kaj ĉijare ni ripozis en la termalbanejo en Komarom (Hungario). Survoje, dank' al niaj pli fruaj kontaktoj, atendas nin esperantistoj kaj niaj noveloj havas impreson, ke la tuta mondo atendas ĝuste ilin. Se mankas temojn ie en la mondo — ni komencas kanti. Oni jam konas nin kiel la plej moveman grupon dum ĉiu aranĝo.

Granda mobilizado okazas antaŭ ĉiujaraj klubaj aranĝoj okaze de mort- kaj naskiĝdatreveno de Ludoviko, kaj neni el la klubo rifuzas helpi. Tiuj aranĝoj fakte estas por la loĝantaro, ĉar ni deziras rakonti al ĉiuj pro kio fascinas nin ĝuste Esperanto. Subtenas nin 6-jaraj infanoj ĉar jam de 4 jaroj ni instruas Esperanton en 2 infanĝardenoj. La infanoj kutime partoprenas aranĝojn kun geavoj, gepatroj kaj gefratoj: tiamaniere por la momento nia E-familio pligrandiĝas kaj iĝas multgeneracia.

Dum la tuta jaro bjalistokanoj ofte festas en sia klubo nom- kaj naskiĝtagojn, la naskiĝojn de nepoj esperante, ke ili iam iĝos esperantistoj, la Tagon de Virinoj, la 1an de majo kiel la Ago-Tagon por la klubo kaj karnevalajn balojn. La klubo vere vivas. La junulara rondo BABELTURO, kiu agas kadre de nia Bjalistoka E-Societo, estas nova kaj ankraŭ malfor-

ta sed ĝia estro similas al lupido kaj mi kredas, ke li multe sukcesos. Por neni estas novaĵo, ke ĉiu formala aŭ neformala grupo bezonas gvidanton. La postvivo de eĉ grandaj organizoj aŭ kluboj dependas de la aktiveco de unuopaj personoj. En Bjalistoko ili ekzistas kaj ne plendas farante laŭ „la iama pozdana maniero” bazan laboron (pole: praca u podstaw). Venu kaj konatiĝu kun nia gastameco.

83a Germana Esperanto-Kongreso

La ĉijara kongreso de germanaj esperantistoj okazis en Brunsviko inter 2–5^a de junio, kie venis pli ol 200 personoj, la reprezentantoj de preskaŭ 20 landoj. Partoprenis la kongreson reprezentantoj de multaj landaj asocioj ne nur el Eŭropo sed ankaŭ el foraj transmaraj landoj.

Polan E-Asocion reprezentis prezidanto Stanisław Mandrak kaj ano de Revizia Komisiono — Andrzej Kiszkiel. UEA reprezentis la prezidanto Renato Corsetti.

Kongreso estis ligita ankaŭ kun la jubileo de 100-jariĝo de organizita esperantista agado en Germanio. Urbo Brunsviko estis elektita kiel kongresurbo pro la fakto, ke antaŭ 100 jaroj ĉi tie oficiale naskiĝis Germana E-Asocio. Krom prelegoj pri historio de E-movado en Germanio, kiujn prezentis inter alie Ulrich Lins, Werner Borman kaj Detlev Blanke, partoprenantoj povis amuziĝi ĉe grupo „Asorti” el Litovio aŭ „Trio Klasika”. Pri lingvaj problemoj ↵

Inter artaĵoj naturaj kaj homaj

Silezia Esperanto-Asocio aranĝis en la tagoj 16–26.08.2006 la 40^{an} Internacian Feriadon en Kudowa Zdrój. La alta numero de la aranĝo rememorigas al ni emon kontinui tre popularan iam, vrocĵavan feriadon „La Ora Pola Aŭtuno” en Międzygórze, en kiu partoprenis kutime 350 ĝis 500 personoj! Malnova tempo (70^{aj} kaj 80^{aj} jaroj) jam ne revenos, nia grupo nombris dudekelkajn personojn, sed ĉiuj, kiuj ne ĉeestis, povas ege bedaŭri.



en Eŭropa Unio parolis Renato Corsetti kaj Zlatko Tišljar. Dum la solena malfermo kiu okazis en Brunsvika urbodomo, krom lokaj urbaj gravuloj, salutis la kongresanojn urbestro de la urbo Herzberg, kiu anoncis, ke post kelkaj tagoj urbo Herzberg oficiale ricevos la nomon „Esperanta urbo” [pri la elekto de tiu ĉi nomo ni skribis en la pasinta numero de Pola Esperantisto — red.].

Dum la vizitado de la vidindaĵoj de la urbo oni disdonis multege da informiloj pri Esperanto. Urbanoj interesiĝis pri granda grupo da trapasantoj dum sabata tagmezo kun E-flago kaj volonte prenis la preparitajn informilojn pri la internacia lingvo. Oni devas substreki bonan organizadon kaj abundan programon.

Stanisław Mandrak

Teresa Pomorska kaj Bogdan Dembiec certigis al ni bonajn kondiĉojn loĝi kaj manĝi en ripozdomo „Agat”, kaj antaŭ ĉio la programon, kiu sufiĉus por du aranĝoj. Matene Bogdan gvidis laŭdatan kurson por komencantoj, iom pli poste Teresa Neme-re el Toruń okupiĝis pri progresantoj, aplikante gramatikajn ekzercojn, ekzercojn pri rakontado kaj kurson de nociaro, rilatanta al belaj artoj. Ĉio ĉi estis farita perfekte kaj pacience.

Dum vesperoj oni kantadis (en kio helpis freŝe eldonita de SEA „Esperanta kantaro”), dancadis en lokaj kafejoj kaj partoprenis en individuaj elpaŝoj de la feriadanoj.

Urszula Zybura, la majstrino pri kurtaj literaturaj formoj, prezentis sian plej novan libreton „Zyburaki”, kies ĉarma inventemo baziĝas je dua-bla signifo de inteligente transformitaj, unuopaj vortoj.

Lidia Ligeza, surbaze de dudekelkaj siaj tradukoj, rakontis pri etapoj de la naskiĝanta Esperantigo de pola poemo.

Roman Dobrzyński prezentis propran filmon pri Universala Esperanto-Kongreso en Pekino kaj rakontis pri sia laboro de Esperanto-instruisto en Ĉinio, substrekante la malfacilajn momentojn, kiuj ĉe eŭropaj lernantoj neniam okazus.

Kazimierz Leja parolis pri sia eldonejo „Hejme”, prezentante laste aperintajn librojn kaj la revuon „Pola Esperantisto”, festanta sian 100-jariĝon, kio estis fruktodona, ĉar venis kaj novaj abonantoj, kaj aĉetintoj de libroj (i.a. de „La roma triptiko” de Johano Paŭlo la Dua, en traduko de Lidia Ligęza kaj „Alia Venecio” de Predrag Matvejević, en traduko de Tomasz Chmielik).

Stanisław Rynduch, gasto el Germanio, la plej pitoreska persono de la feriado, elpaŝis rakontante spritaĵojn kaj bonege ludante buŝharmonikon. Li posedis ankoraŭ unu gravan allogaĵojn — etan, blankan, ĉinan hundine-ton Luna, kiun ekamis la tuta grupo.

Teresa Nemere realigis sian programeron plej solene. Lekcio pri Torunaj spickukoj estis ornamita per speciala kanto, kaj gustumado de spickukoj kaj medo.

Plaĉis la kelkparta programo de Witold Czerwiński „Freŝo”. Oni devis finsolvi multe da diversaj lingvaj kaj movadaj divenoj — ne ĉiam bone, sed ĉiam bonhumore.

En la tagoj 25–27.08. okazis en Kudowa la 44^a Festivalo de Stanisław Moniuszko. Ni havis okazon ekaŭdi kelkajn programerojn — certajn verkojn de pli notita en fontoj por kleraj popoloj ol fakte aŭdata komponisto. Interesa estis turniro de 9 tenoroj (kun merita de jaroj Bogdan Paprocki alfronte), kiuj kantis verkojn ne nur de Moniuszko, sed ankaŭ de Puccini, Leoncavallo, Dionizetti, Paderewski. Plaĉis opero de Antonin Dvořak „Jakobeno” — apoteozo de forto

kaj belo de la ĉeĥa muziko kaj lando, multpersone plenumita en „Teatro sub Lado” de koruso kaj orkestro de Moravia Teatro en Olomouc. Programo de la Festivalo kompletigis kaj riĉigis niajn feriadajn travivaĵojn.

Posttagmezoj apartenis al Teresa Pomorska, kiu sukcese montris al ni la urbon Kudowa kaj ties ĉirkaŭaĵojn, ne nur polajn. Unu el plej popularaj kuraĉlokoj en Pollando, Kudowa Zdrój, belas dank’ al mono de Eŭropa Unio. Oni renovigis konstruaĵojn, zorgeme flegas bedojn kaj gazonojn de la angla parko, fondis Akvoparkon kun plej longa en Pollando glittubo. Agas kelkaj muzeoj (i.a. „Muzeo de Ludiloj”, ariganta malnovajn kaj novajn ludilojn de diversaj popoloj, fari-taj el diversaj materialoj).

Jam en la jaro 1636 oni konstruis ĉi loke la unuajn ban-instalaĵojn. La vera signifo de Kudowa datiĝas ekde 1905 jaro. Naŭ mineralaj akvoj kuracas malsanojn de sangocirkulado, sangokreado, digestado kaj neŭrozojn. Trinkejo, kunligita kun koncerta salono, troviĝas en la parko, tie ankaŭ ĉarmas secesia promenhalo, uzata nuntempe kiel „Teatrejo sub Lado”, por artprezentadoj. En kuracoj helpas ankaŭ artefarita sal-joda kaverno. Utiligante la salon el La Nigra Maro oni saturis ĝian aeron per jodo, fero, magnezio, kalcio kaj kalio.

Atingebla post ne tro longa marŝado vilaĝo Czeramna mirigas kaj timigas pro la kurioza Kapelo de Kranioj. Laŭ la baroka gusto murojn kaj volbon kovras kranioj kaj ostoj de homoj, kiuj mortis pro epidemio de

ĥolero kaj dum sileziaj militoj. En la kapelo troviĝas restaĵoj de 3 mil da homoj, sube de 21 miloj.

La Tabla Montaro famas pro — similaj al artefaritaj rokaj formoj — labirintoj kaj vid-teraso. Ni rezignis de Szczeliniec Wielki (919 m), sed ni vizitis Erarvojajn Rokojn (852 m) kaj Blankajn Rokojn. En granda labirinto de diŝetitaj ŝtonegoj oni devis eĉ trapuŝi sin trans fadenoj. Sed tiu peno estis premiita per ebleco ekvidi rokojn, nomitajn Tabla Ŝtonego, Roka Stelo, Koka Piedo, Roka Pordego, Ĉevala Gambo, Kaŝejo, Tunelo, Roka Pokalo kaj aliajn.

Ankoraŭ pli fortaj travivaĵoj atendis min en pitoreska masivo de sabloŝtonaj formoj, post la ĉeĥa limo, Adršpaŝsko–Teplicke Skaly. Tiu nacia natur-rezervejo, neimageble granda, formas „rokan urbon”. Kelkcent da diversformaj, rokaj muroj kaj bastionoj, ĝis 100 m altaj, ankaŭ havas romantikajn nomojn, laŭ homaj asociacioj: Elefanta Placo, Dento, Gemantoj, Distriktestro kun Edzino, Katedralo, Sbiro, Diabla Ponto. La plezuron ĝui kaj admiri ilin fuŝis putrigitaj pontetoj, ŝtuparoj kaj apogiloj, malsekuraj por fidemaj vizitantoj. Kelkajn pli kuriozajn ni eĉ fotis. Miriga afero, ke la aŭtoritatoj de Rezervejo ne riparis ilin. Eniro al la „roka urbo” ne estas ja senpaga!

Interesaj estis ekskursoj al du ĉeĥaj lokoj kun belaj ekzemploj de la malnova arto. La konstruaĵaro en Kuks konsistas el du longaj aloj, kunligitaj per impona kapelo. Ilia destino estis eksterordinare nekutima. En unu alo

loĝis riĉa grafa familio Ŝpork, en dua troviĝis fondita de František Antonín Ŝpork en 1695 jaro hospitalo, posedanta multe da lokoj kaj grandan apotekon, kiun kun la originala provizaĵo ni avide rigardis. Loĝantaro de ambaŭ partoj de la rezidentejo kunvenadis de malproksime nur en la kapelo, kies la pli modesta anekso estis destinita por la pacientoj.

František Ŝpork ankaŭ malavara apogis muzikon. Dank’ al li paroĥestro el Chroustov, Jan Jozeff Božan povis eldoni en la jaro 1719 sian vastan kanzonaron „Slaviček r’ajský”, enhavantan 830 kantojn, ne nur piajn. Multajn ekzemplerojn la grafo donacis senpage al diversaj preĝejoj. Muziko de ĉi kanzonaro estas ĉiusomere ludata en kapelo de Kuks, enkadre de la aparta festivalo.

Kun Kuks estas ligita verko de aŭstria skulptisto Matthias Bernard Braun (1684–1738), la aŭtoro i.a. de skulptaĵoj sur Ponto de Karlo en Prago. Liaj multaj, grandaj, plenaj de dinamismo kaj impeto figuroj ornamas defendan muron ĉirkaŭantan spacon antaŭ la rezidentejo. Ili montras personigitajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la homo. Saĝeco, Modesteco, Prudento, Orgojlo, Voremo, Ruzeco parolas ne nur per atributoj, sed antaŭ ĉio per mienoj kaj gestoj. Nenio mirinda, ke la skulptisto verkanta laŭ principoj de la granda G.L. Bernini, forte influis al malfrubaroka ĉeĥa skulptisto de la XVIII jarcento. Eksterordinara estas komplekso de skulptaĵoj de M.B. Braun plejparte dediĉita al Kristnasko, si- ➤

Alia Venecio


Multrilate eksterordinaran kaj surprizan, ĉiel pensigan libron pri Venecio verkis Predrag Matvejević, kroata intelektulo, profesoro de franca literaturo, lekcianto de Universitato La Sapienza en Romo. Estis multaj



tuita en... proksima arbaro. La artisto faris ĝin senpage en arbaraj rokoj — leĝere kaj ĉarme. Oni nur povas bedaŭri, ke la tempo kaj barbarajoj forte difektis la grandiozajn verkojn.

La arton de M.B. Braun ni havis okazon admiri ankaŭ en Nove Mesto nad Metui. En vasta, kelknivela ĝardeno de situita sur kruta bordo de rivero Metuja kastelo troviĝas muro, sur kiu staras dekkelkaj figuroj de Nanoj kaj Naninoj en vastaj de la ĝusta epoko, havantaj korpojn kaj vizaĝojn karakterizajn por tiuj malpligrandigitaj homoj, skulptitaj kun la admirinda majstreco. Nove Mesto nad Metui fondita en 1501 jaro kiel renesanca urbo-fortreso havas ne nur interesan kastelon. La Urboplacon ĉirkaŭas ĝia enira parto, brikdomoj de XVI jarcento, kaj gotika preĝejo, kio formas rigardindan tuton.

Pro diversspecaj impresoj dum la Feriado mi ege dankas al Silezia Esperanto-Asocio kaj ties oferemaj kaj kompetentaj anoj — Teresa Pormorska kaj Bogdan Dembiec.



aŭtoroj, migrantaj tra Italio de nordo suden, kaj dumvoje vizitantaj tiun mirindegan urbon ĉe Adriatiko: Goethe, Byron, Ruskin, Marcel Proust, Henry James, Thomas Mann, Sandor Marai, Josif Brodskij, Gustaw Herling-Grudziński... Antaŭ ol verki sian libron Matvejević estis konscia pri tio, ke lia klopodo elekti la urbon en la Laguno kiel literaturan temon ŝajnas preskaŭ senespera, kaj supre nomitaj antaŭuloj elpemis ĝin kiel spongon ĝis lasta guto. *La historio de Venecio estas skribita kaj mi ne scias, kion novan mi povus aldoni* (p. 51) iom hezite kaj dubeme, kun ia amaro konstatis Matvejević, sed per jenaj vortoj li montris samtempe la deziron liberigi sin de la riĉa tradicio pri vojaĝliteraturo, en kiuj Venecio estis la unua sperto de intimiĝo kun Italio aŭ transiro en la alian mondon de koloroj kaj lumo, li ankaŭ rezignis pri la mito de la dekadenco kaj morto, kies simbolo estis nigra gondolo sur la malvigla akvo, kio tiel maltrankviligis Gustavon Aschenbach el la fama Manna novelo. Sed ĉiuj ĉi duboj ne forlasis la aŭtoron eĉ poste, kiam li finfine alprenis kun humilo tian konstaton: *Tiu kiu denove skribas pri la Baziliko kaj pri la Placo de sankta Marko aŭ pri la Kampanilo, pri la preĝejo de Santa Maria della Salu-*

te, pri Ca' d'Oro kaj pri Ponte dei Sopi-ri, pri la tradicia karnavalo, pri historia regato, pri la fama galerio de la doĝoj Bucintoro kaj tiel plu, ne scias, kion li riskas: tio sukcesas malofte, ŝajne unufoje en generacio, du, tri fojojn en jarcento. Kaj nia jarcento pasis, kaj nia generacio malgrandiĝis (p. 12).

Tamen Matvejević ne cedis, li trovis la ĝustan manieron elturniĝi el tiu kaptilo de la banalo — simple li ŝanĝis perspektivon. Li kroĉis sian atenton al detaloj, pli ĝuste al detaloj malĉefaj, plej ofte kaj kutime preterlasataj de aliaj verkistoj. Pu-trantaj lignaj fostoj enbatitaj en la fundon de la Laguno, feblaj plante-toj, kiuj elkreskas sur disfalantaj mu-roj kaj enradikiĝas en fendetojn inter ŝtonplatoj, cocci — forĵetaĵoj el me-tiejoj produktantaj la famajn Vene-ciajn keramikaĵojn, enmasonitaj en murojn kaj fundamentojn, plifortiki-gantaj remparojn aŭ simple enĵetitaj en akvon... Matvejević ne marŝas al la Palaco de la Doĝoj, sed li serĉegas Brundulum, malnovan subakviĝintan havenon, aŭ jam ne ekzistantan insu-lon San Marco in Boccalama. Tre gra-vas por li serĉado de tiuj lokoj, objek-toj kaj konstruaĵoj, kiuj ne konserviĝis ĝis la nuna tempo. Sed li samtem-pe konscias pri ilia daŭro, pri la tem-po fluanta senbreĉe, kaŝanta ĉion en helaj kaj malhelaj anguletoj de la his-torio. Sur la bildo de Tiepolo **Kalva-ria Vojo**, en la preĝejo Sant' Alvis, oni vidas, ke Kristo falas sub la kruco sur amason da ŝtonoj, kie elkreskas fragi-laj tigoj kaj folioj... [...] Denove mi ri-gardis bildojn de Carpaccio, Giorgio-

ne, Veronese, Ticiano. Ili ankaŭ iradis preter la muroj, sur kiuj ĝermis la mo-destaj plantetoj (p. 39-40).

Tio sekvas el la principo, kiun ver-konte akceptis Matvejević — estas la vortoj aŭditaj iam en Muggia apud Triesto: Ne priskribu la urbojn, tra kiuj vojaĝis multaj, iu jam faris tion antaŭ vi, eble pli bone kaj Evitadu la lokojn konatajn por ĉiuj, evitadu tion. En sia libro la verkisto obeas tiujn du konsilojn, kaj samtempe admonojn. Anstataŭ la Bazilikon de sankta Mar-ko li rigardas malnovajn sekiĝintajn putojn, anstataŭ la ponton Rialto li vi-zitas insuleton, kie forpasas mevoj. Li rememoras gastejojn, post kiuj restis nur la nomoj skribitaj de kronikistoj. Priskribante matenojn kaj vesperojn li nomas tiajn ventojn kiel *bora*, *tra-montana*, *scirocco*, *levante*. Unu el la plej ravaj estas la ĉapitro pri amaso da specoj da pano mangata en Venecio kaj en tiu bakista historio la spurojn postlasis tiuj, kiuj rifuĝis sur la bordoj de la Laguno — sefardaj judoj, grekoj, armenoj, kaj ankaŭ tiuj, kiuj ĝin kon-keris — francoj kaj aŭstroj.

Nomante tiajn detalojn, liberigan-te ilian vidaĵon el la krusto de frem-daj rigardoj, Matvejević havigas al sia leganto unikan ŝancon retro-vi la urbon nur por si. Enkonduke al la itala eldono de *Alia Venecio* verki-sto Raffaele La Capria skribas: *Detalo malkaŝata de Matvejević estas kiel ostoj el la skeleto, per kiu komencante, oni povas rekrei la formon de la tuta dinosaŭro. Tiel apartigita ereto de la urbo, ĉu estos rusto sur metala fo-sto aŭ nur patino, malmola ligno de iu*

trabo aŭ ĝia putraĵo, ĉiam kondukas nin al la tuto, el kiu la nomitaj partetoj estis elprenitaj.

Similan metodon de verkado Matvejeviĉ utiligis jam en *Mediteranea Breviero* (aperonta Esperantingve en 2007): detaloza prezentado de ĉiuj ĉi nomoj kreis efekton de mozaiko, neplena kaj diserigita kono, kaj amasigo de la nomoj de nodoj, golfoj, ventoj, ondoj, iloj sugestis precizemon kaj nepriskribeblecon de la mondo prezentata, sed tiu multobligado de signoj ne malaperigis reziston de la realo, kiu malgraŭ la preciza kaj detaloza priskribo, daŭre restis rava kaj nekaptebla per sensoj.

Sekvante kun ravo la fluon de la Matvejeviĉaj bildoj kaj pensoj oni rimarkas, ke *Alia Venecio* estas ankaŭ elegio — disŝutiga skulptaĵo, velkas plantoj, putras lignaj fostoj, mortas mevoj, el la pejzaĝo de la urbo forpasas tradiciaj gastejoj, kaj ankaŭ malnovaj metioj... Malaperas vortoj, perdiĝas nomoj, neniuj zorgas pri la plantetoj, kiuj sekiga sur la muroj, „migrantaj skulptaĵoj” dispeciĝas sur la fasadoj, la palacaj ĝardenoj estas pli kaj pli raraj, en la putoj troviĝas pli multe da mallumo ol akvo, aperas pli malmulte da patino ol rusto, la sunsburoj ne estas tiaj kiel iam, de tempo al tempo la ventoj ŝanĝas direkton... [...] Venecio subakviĝas... Sed ĉio tio ne donas sufiĉan kaŭzon por la mallara nostalgio, kiu povus ekregi nin. Ĉar Venecio kaj tiu alia Venecio ja daŭras kune, samtempe, eĉ se nur en la memoro aŭ imagobildo. Unu vidas ĉiuj kaj ili deziras ĝin. La alian nur malmultaj ri-

gardas kaj preskaŭ neniuj bedaŭras ĝin. Kaj unu sen la alia ne ekzistas kaj ne povas saviĝi. Ambaŭ estas en ni: Venecio kaj *Serenissima*, historio kaj mito, bildo kaj iluzio (p. 132).

Predrag Matvejeviĉ, *Alia Venecio* (Druka Venecija). Esperantigis Tomasz Chmielik kun lingvaj konsilioj de Spomenka Stimeĉ. Enkondukon skribis Renato Corsetti. Eldonis HEJME (Czeladź) / LIBRO-MONDO (Świdnik), 2006, p. 144, ISBN 83-920289-2-9.

Pri siaj interesiĝo kaj okupiĝo pri la kroata literaturo estis — dum sia vizito en Kroatio — intervjuita nia redakcia kolego, Tomasz Chmielik. Unu el la plej grandaj ĵurnaloj de Kroatio, *Vjesnik*, enmetis la tutpaĝan intervjuon kun li, enhavanta multfoje aludojn al Esperanto.

30.10.2006 **CO** Sudovestnik/Agda, 20.10.2006

POVEČALO

Viĉto san ocije V dosta mladih obrascanih ljudi koj nisu pisci, ali citaju u velikom pozornosti. Imate izdrosnu, samo izdavačke kuće moraju ostisćivati bilo vreme...

Imate sjajnu i plodnu književnost

Hrvatska me najbrevnet književnost i izabere se kao najmirvanu delfi ku zadržati

Osmijeh ima veliku moć

Hrvatski je najbrevnet počinak i životni slog je značajna

Thomasz Chmielik



Suvenirni su trajan podsjetnik

Turistiĉki souveniri:

MIKA DALVIĆEVA KUĆA razma odmoru... (text continues)

Julijka Stanić... (text continues)

Kung fu se vešti od... (text continues)

Horst Vogt

La novelaro de Raymond Schwartz:

„Vole... novele: aŭ kvindek jaroj da noveloj 1920–1970”

(kadre de la dua semestro de interlingvistikaj Studoj ĉe novfilologia fakultato de Universitato Adam Mickiewicz en Poznań ĉe mag. Tomasz Chmielik)

Raymond Schwartz, la aŭtoro

La franco Raymond Schwartz (1894-1973), naskiĝinta en tiam germana Metz, estas verŝajne unu el la plej popularaj kaj multe legataj verkistoj en Esperantio. Liaj medioj fariĝis ĉefe la kabaredo kaj la humuraj rakontoj.

Kunlaborinto i.a. de *Literatura Mondo* kaj de la nica literatura revuo li estis influata de la fama *Budapeŝta Skolo*, kies aŭtoroj malbaris al la Esperantaj poezio kaj prozo la vojon el la amatoreco de la fruaj jaroj kaj esence kontribuis al la plialtigo de ties literatura nivelo.

Schwartz fondis kaj vivtenis per propraj kontribuoj la konatajn Esperanto-Kabaredojn *Verda Kato* (1920-26), *Bolanta kaldrono* (1936-39) kaj *Tri Koboldoj* (1944-56) en Parizo. inter 1933 ĝis 1936 li redaktis la satiran gazeton *La Pirato*.

Lia verko ampleksas poemojn, novelojn, du romanojn kaj traktadon pri la ata/ita-problemo:

Verdkata testamento (poemoj 1926; 2a eld. 1930

Prozo ridetanta (noveloj 1928)

Anni kaj Montmartre (romano 1930)

La stranga butikoj (poemoj 1931)

La ĝoja podio (poemoj kaj prozo 1949)

Kiel akvo de l' rivero (romano 1963)

Ne kiel Meier! Invito al revizio de niaj konceptoj pri la konjugacio de Esperanto (1963)

Kun siaspeca spico! (poemoj kaj prozaĵoj 1971)

Vole... novele: aŭ kvindek jaroj da noveloj (noveloj 1971).

La noveloj

Vole... Novele atingis 1981 duan eldonon kiel represo ĉe eldonejo artur E. Iltis, Saarbrücken. La libreto entenas 35 mallongajn rakontojn, kolekton de liaj noveloj el 50 da jaroj de verkado, en variaj gazetoj aperintaj.

Ĉu Schwartz per siaj rakontoj sekvas iun certan celon, ĉu li volas komuniki iun gravan ideon, konigi profundan veron, alvoki ne pretervidi minacantan problemon? La aŭtoro antaŭmetas moton super la verkon, sed ni ne atendu ion mondskuan:

„Laŭ konata sentenco de Boileau en la literaturo ĉiuj specoj estas bonaj, krom la... enuiga. Mi ne havis alian celon ol eviti tiun lastan”. Do, senpre-tenda, nura felietona distraĵo forge-sinda post la legado? Ja la rakontoj estas ĝenerale simplaj laŭ enhavo, sed Schwartz distras la leganton je alta nivelo ĉefe lingva. La aŭtoro sur-paperas ĉiutagaĵojn (*La pipo de Prosper, La ĝojaj ĝemeloj, Bapto de son-rilo en Mulmont*), satirojn (*Pakaĵo el Usono, Protektu la bestojn!, Abstrak-tismo*), ankaŭ ekzemplojn de „nigra” humuro (*Ĉe l’ entombigo de l’ povra Aleksandro, La putro de Paupelèche, Botoĉel*), ĉiam serĉante kaj trovan-te la „ridpunkton”, la ridindan en la sinteno de homoj, la aplombon, feb-lecon kaj pekemon de aliaj, la falsan ambicion, la kalkulan ruzon de iu tria. Schwartz primokas, ridindigas, sed ne levas la moralan montrofingron, kiel bona pastro li neniel juĝas aŭ kondamnas, sed milde pardonemas. Li kaŭzas amuzon, elvokas rideton, sed ne provokas malican ridegon je malavantaĝo de la primokato.

Lia simpla konsilo al la legantoj povus esti: „Mi ne havas ion ekste-rordinaran por malkaŝi: Vivu bone kaj ĝue, rilatu amike kun aliaj kaj lasu ilin fariĝi feliĉaj laŭ propra gusto”.

La rimedoj de la aŭtoro

Kiamaniere Schwartz atingas sian efikon? Li tre bone konas siajn kun-homojn, ĉar li scias akre observi ilin kaj krome, li supozeble malkovras ĉiujn ecojn de la homa naturo ankaŭ en la propra animo.

Sed la ĉefa amuzo eliras de lia lin-gvouzo, kiu alportas ankaŭ la apar-tan ĝuon al liaj noveloj. Ravas ele-ganta stilo, la ĉiam trafe ornamaj epitetoj, la surpriza metafora uzo de substantivoj, verboj aŭ adjektivoj:

Dusabre, tiu terura ĝendarmo, in-spektis la vilaĝon en ne regulaj in-terspacoj. Sur sia biciklo li aperis senaverte kiel aprila pluvo, kaj mal-bonhumora kiel ĝi... La buboj sur la stratoj forgesis siajn ludojn. Eĉ la kor-tobirdoj timis lin kiel akcipitron kaj klukante rifuĝis al siaj nestoj. La va-gantaj hundoj mistere malaperis. Nur la bovinoj, ĝenerale pli scivole-moj ol klaĉulinoj, trankvile daŭrigis sian vojon, kaj neniel okupiĝis pri la ĝendarmo, kvazaŭ li estus simpla fa-miliano” (el: la ĝendarmo deĵoras).

Komence, kaj verŝajne nur pro ĉeesto de la du sinjorinoj, la kontakto inter gastigantoj kaj invititoj estis iom amelita. Ambaŭflanke oni ŝablone ĝentilumis inter komplimentoj bone-duke korsetitaj (el: Necesas laksigi ko-legon Tripp).

Same ravas la Schwartza emo, ri-detigi nin, priskribante iun protago-nistan econ aŭ agon per iom pompa aŭ pseŭdoscienca, ironia parafrazo:

Kvankam ŝi ne estis preofesia koke-tulino, Yvonne Dufour ankaŭ hodiaŭ perdis multe da tempo por aldoni al natura lipruĝo de siaj dekok jaroj nur tiom da artifiĉa, kiom ĉiu honesta vi-rino rajtas por aspekti kiel aŭtentika parizanino: apenaŭ duonkrajonon. Per rapida pudrumo ŝi ankoraŭ mil-digis la arogantecon de tro ŝminkitaj vangoj kaj lastfoje dronigis bazararti-

klan kombileton en la densajn ondojn de moderne tondita hararo (el: *La alia flanko*).

Samspece:

Paupelèche miksis la trinkajon, aldonante per gestoj preskaŭ sacerdotaj al la likvoro, jam en la glasoj, la necesajn kvar kvinonojn da akvo, verŝante et-et-fluete, tiel, ke ambaŭ elementoj, la fajro, la akvo, penetris unu la alian lascivmove sub vualo de nebultavolo, invade disvastiĝanta, ĝis kiam la pastiso, nun fluidaĵo, duonflava-dube-verda, mistere malklara, estis preta liveri sian sekreton (el: *La puto de Paupelèche*).

Male al Kiel akvo de l'rivero la kolekto Vole... Novele ne entenas glosaron por komenti la uzitajn vortojn tiam ankoraŭ ne komunajn al ĉiuj legantoj. Tamen oni rajtas supozi, ke Schwartz en la novelkolekto ne evitas esprimojn, tiam ankoraŭ neologismaj. Kiel aŭtoro inklinante al la Budapeŝta skolo kaj publikante siajn verkojn ankaŭ en *Literatura Mondo*, li certe volonte subskribus, kion Kalocsay kaj Waringhien docentis pri la lingvouzo. Por Kalocsay lingvo estas kvazaŭ memcelo, pasio eĉ, por kiu oni oferas, sen atendante iun gajnon. Pro tio li emfazas la neceson de progresinta, evoluiĝinta lingva materialo. Li postulas lingvaĵon, kiu superas la por ĉiu Esperantisto nepre necesan „limigitan vortprovizon vulgaran”, tiun „trunkon de la lingvo”, por ke en lertaj manoj la lingvo povu disvolvi fortajn kaj delikatajn efektojn por tute forgesigi sian artefari-

tecon¹. Ankaŭ Waringhien, kiun oni sub sia pseudonimo G.E. Maura — same kiel kunaŭtoro de la *Parnasa Gvidlibro* — devas kalkuli inter la adeptoj de la Budapeŝta Skolo, same verve pledas kontraŭ „unugroŝa Esperanto” aŭ „pure logika lingvo” por la enkonduko de novaj ne oficialaj sed esprimivaj radikoj².

Alia temo estas la konata manio de Schwartz, eble plej ofte stumbli la leganton per iu neatendita vortludo. Tamen li aplikas vortludojn en siaj noveloj nur ŝpareme. Laŭ mi feliĉe. Ĉar, kiel prave rimarkas Sten Johansson (kp. T. Chmielik, KD „Lit II”, Schwartz.doc), tro ofta metodo de tiaj spritaĵoj enuigas, aparte kiam la leganto ricevas la impreson, ke la aŭtoro tordas la tekston por povi enŝovi novan eltrovaĵon. (Tiu impreson ankaŭ mi ricevis legante la tekstojn titolitajn *Je mia ridpunkto* en la kolekto *Kun siaspeca spico*. En *Kiel akvo de l' Rivero* oni povas havi la impreson, ke la figuro de Hans Paŭlig / Paŭl Hansig ŝajnas esti inventita ĝuste por povi elmeti tian lingvajn ŝercojn).

Demando, kiu stariĝis por mi nur post legado de la kritiko de Johansson: la virinoj en la rakontoj de Schwartz, iliaj roloj kaj karakteroj. Ĉi-rilate mi ne samopinias kun Johansson. Tiu ĉi rimarkas, ke la viraj rolantoj, kvankam trafitaĵoj de ĉiuj malvirtoj kaj mankoj, malgraŭ siaj misfa-

¹ Kalocsay, *Lingvo, Stilo, Formo* p. 52, 57

² Kalocsay, Waringhien *Parnasa Gvidlibro*, antaŭparolo p.10

roj ĉiam rajtus esperi mildan absolvon de la aŭtoro, dum male virinojn li priskribus senkompate — la junajn — „kiel vampirinojn aŭ — post ilia edziniĝo — kiel megerojn”. Johansson eĉ suspektas ion misan en la rilatoj de Schwartz al la virinoj!³ Nu jes, rigardate sole la novelojn oni eble povas ricevi tiun impreson. Sed laŭ mia opinio evidentas, ke Schwartz simple uzas tiajn stereotipojn por povi konstrui humuran fonon por la intrigo. Oni ja povas disputi, ĉu tio estas tre originala aŭ erudicia modelo por rakonto. Sed leganto de lia romano *Kiel akvo de l'rivero* konatiĝas kun virinoj de tre diversaj karakteroj, ĉiuj tute favore pentritaj (ekz. sinjorinoj *Bertringer* kaj *Geist*, la filino *Lotte Geist*, fraŭlino *Annemarie Balkenwirth*, la amatino de la protagonisto *Pierre Touchard*. Eĉ la iom frivola servistino *Guste* ne malsimpatias). Mi neniel dubas, ke Schwartz ne tendencas al antaŭjuĝoj kontraŭ virinoj. Mi mem ricevis la impreson, ke male li admiras kaj eĉ amas ilin.

Resumo

Certe ne ĉiuj noveloj estas same bonaj laŭ ilia temo aŭ enhavo, kiel prave atentigas Johansson. *Lokomotiva koro*, *La viro sub la lito*, *La oficiala paroladisto*, *Eksterprograme* mi metus en tiun keston. Sed mi povas certigi, ke ankaŭ tiujn rakontojn mi kun ŝato legis pro ilia lingvaĵo majstra.

Se Schwartz propravorte ne celas ion alian ol distri kaj ne enui la legan-

ton, tiam li bravure per sia lingva majstreco atingas sian celon. Ankoraŭ hodiaŭ post naŭdeko da jaroj ekde la apero de la unuaj pruvoj de sia novela talento, Schwartz restas tre bone legebla.

Bibliografio

Raymond Schwartz, *Kiel akvo de l'rivero*, romano, eld. artur E. iltis, Saarbrücken, 1987; represo de la eldono de La Laguna 1963

Kalman Kalocsay, *Lingvo Stilo Formo*, studoj, tria, parte tralaborita eldono, eld. Pirato, Oosaka, 1970

K. Kalocsay, G. Waringhien, R. Bernard, *Parnasa Gvidlibro*, 3a eldono, reviziita kaj kompletigita de G. Waringhien, reeldonita laŭ permeso de Heroldo de Esperanto; eld. Edistudio Pizo/Madrid 1984

Raymond Schwartz, *Vole... Novele aŭ kvindek jaroj da noveloj*, 1920 — 1970; eld. artur E. iltis, Saarbrücken 1981 (represo).

Eldonejoj: HEJME kaj LIBRO-MONDO planas komune reeldoni ĉiujn verkojn de Raymond Schwartz, kiuj estas jam pretaj por presejo. Ni atendas nun (pagotan) skriban permeson de kopi-rajto-havantoj. Pri progreso de la afero ni informos niajn legantojn.

Dume, ni kore invitas ĉiujn libro-ŝatantojn viziti la hejmpaĝon de la eldonejo HEJME, kaj mendi librojn, kiujn vi ankoraŭ ne posedas. Por E-kluboj, kiuj mendas minimume 10 ekz. de la sama titolo estas valida 20-procenta rabato kaj senpaga sendo.

³ Sten Johansson „Varia kvalito” p. 7

EL Tehrano al esperantistoj

Por poloj Persujo asociiĝas kun Pola Armeo, kreita dum la jaroj 1941–42 en Sovetia Unio kaj evakuita sub la gvido de generalo Władysław (Ladislaw) Anders al Irano kaj Irako.

Nuntempa Irano nombras 70 milionojn da geloĝantoj, kiuj vivas sur la teritorio de 1600 mil da kvadrataj kilometroj, situigintaj en sudokcidenta Azio. La nomo — Persujo devenas de la tempo, kiam grekoj provinse konkeri nunan Iranon, eknomis ĝin Persis. Persio — nomiĝanta de la jaro 1935 IRANO estas nun Islama Respubliko, en kiu la oficiala religio estas Islamo kaj preskaŭ ĉiuj geirananoj estas Islaman/in/oj.

En Irano ankaŭ vivas la sciipovantoj de Esperanto.

Kaj ĵus en tiu lando estas aĉetebla (atenton!) ... en ĉiu kiosko kun gazetoj kaj en ĉiu librovendejo — IRANA ESPERANTISTO — „la kultura kaj sendependa sezon–revuo internacia, kiu presiĝas en Irano Esperante kaj perse” — kiel estas legate apud la persa titolo de IE: Pajam–e Sabzandishan. Do, la duono de IE estas en la persa lingvo — tiu „de la fino” laŭ nia stilo kaj la dua duono en Esperanto — „de la komenco” — laŭ latineŭropa maniero tajpi kaj legi presitajn paĝojn. Ni ĉi tie rememoru, ke en arabaj landoj oni kutimas skribi kaj legi de dekstre maldekstren.

Por la 21a de nunjara marto — la komenco de Nova Jaro en Irano, aperis laŭvica numero de Irana Esperantisto, dedeiĉita al Ferdoŭsio — la rekreinto de la persa lingvo. Pri tiu

eminentulo la irana oni povas tralegi interesan artikolon, titolitan: „Zamenhof kaj Ferdoŭsio”.

Por amantoj de la poezia lingvo estas legemaj pliaj dulingve montritaj poemoj: „La Floroj” de Ŝahname, tiuj de alia poeto Sadio kaj „Larmo estas sekreto” de Ahmad Ŝamlu.

Por geamantoj de naturo oni proponas legi la bildigitan tekston pri Alisadr–Kaverno kaj la artikolon pri Amazon — asociiĝantan kun la rivero Amazonca, ĉu ne?

La Cseh–instruistino en Serbio — Tereza Kapista, kiu dum multmonata restado kaj volontula instruado de Esperanto por geirananoj, sur laŭvicaj kvar paĝoj lokigis sian, jam trian — la finan, parton de sia priskribo de la untempa Irano. Redakcio de IE ankaŭ montras sian landon en la komencita serio da tekstoj pri ABC de Irano.

La laŭvica numero de *Irana Esperantisto* estas belaspekta kaj tre enhavoriĉa. Kaj havas ankoraŭ unu tre gravan aspekton — oni povas montr/ad/i ĝin al geamikoj

1. kiel diversaj lingvoj estas la persa kaj Esperanto kaj

2. ke ankaŭ en tiu lando vivas gesamideanoj, por kiuj nia komuna Lingvo estas valora por lern/ad/i kaj komuniki kun ni de aliaj landoj, de aliaj kulturoj kaj kutimoj por la vivo.

Pliajn informojn pri Irana Esperantisto oni povas traklegi vizitante la retejon: http://eo.wikipedia.org/wiki/Irana_Esperantisto

Stanisław Śmigielski
peranto de Irana Esperantisto

Preskaŭ ĉio pri la prepozicio ANTAŬ

La prepozicio **antaŭ** estas sufiĉe ofte uzata de esperantistoj, do indas konatiĝi kun multaj ekzemploj de ĝia uzado en diversaj situacioj.

Ĝenerale dirite tiu ĉi prepozicio estas montranta:

1. Lokon al kiu frontas la ĉefa flanko de la objekto, aŭ lokon pli proksiman al rigardanto.

Ekz.: **Antaŭ** koŝalina urbodomo (= ĉe la antaŭa flanko de la urbodomo) troviĝas gardata aŭtoparkejo. **Antaŭ** mia domo kreskas kvar juniperoj. Dum ŝipnavigado **antaŭ** ni etendiĝis la senlima maro. Li kliniĝis **antaŭ** ŝi ĝis la tero. Ŝi malkovris **antaŭ** li sian koron. La vidvino tre ofte genuiĝas **antaŭ** la figuro de Madono. La mortinta edzo staras ĉiam **antaŭ** ŝiaj okuloj.

2. Lokon rigardatan de iu (= sub la okuloj de, en la ĉeesto de).

Ekz.: Li estas konata ĵurnalisto, respondeca **antaŭ** siaj legantoj. Politikistoj ofte parolas **antaŭ** vasta publiko. La genepoj tute ne sentis timon **antaŭ** S-ta Nikolao. Pseŭdofanoj de futbalo ofte perdas la respekton **antaŭ** policianoj. Krimulo iome tremis **antaŭ** spertaj juĝistoj. Investantoj subskribis kontrakton **antaŭ** notario. Multaj homoj ne sentas skrupulon **antaŭ** la akcepto de koruptaĵo.

3. Tempon pli fruan ol alia tempo (= pli baldaŭ ol).

Ekz.: Tio okazis **antaŭ** pasintjara Kristnasko. Tiam ni vespermanĝis **antaŭ** la kutima horo. Li vizitis min **antaŭ** Pasko. La dancado finiĝis **antaŭ** noktomezo. La prunedonitan libron redonu al mi **antaŭ** semajnfino. Mi sendos al vi retmesaĝon **antaŭ** dimanĉo (plej malfrue en sabato). **Antaŭ** kelkaj monatoj mi festis modeste 50-jariĝon de mia esperantisteco. Por ĝui bonan sanon trinku ĉiutage **antaŭ** matenmanĝo unu kaliketon da mirakla fitopreparaĵo AL-VEO.

4. Pozicion pli altan en graveco aŭ rango.

Ekz.: Mi ŝatas vin **antaŭ** li, ĉar mi preferas malriĉulon **antaŭ** riĉulo. La pliboneco de Esperanto **antaŭ** Volapük estas frapante granda. Esperanto estas **antaŭ** ĉio logika kaj eksterordinare facila lingvo.

Rimarkoj:

a) Tempa **antaŭ** estas ofte uzata en esprimoj de horo.

Ekz.: Estas dek minutoj **antaŭ** la kvina. Fariĝis jam kvarono **antaŭ** la tria.

b) Proksimuman tempo-punkton oni povas esprimi per **de antaŭ**.

Ekz.: Tiuj ostoj postrestis **de antaŭ** la diluvo. **De antaŭ** ok tagoj li kuŝas

en la lito ne manĝante. *Indas ankaŭ scii:* **De antaŭ** tri jaroj estas proksimume signifa kun **ekde** tri jaroj.

c) La prepozicio **antaŭ** povas montri eĉ la pozicion en ia sinsekvo.

Ekz.: Mi iras **antaŭ** vi (= mi iras antaŭe, vi sekvas min). La litero **R** staras en la alfabeto **antaŭ S**.

d) En iuj okazoj oni uzas **antaŭ** kune kun **ol**.

Ekz.: **Antaŭ ol** ni iris al teatro, ni vespermanĝis. **Antaŭ ol** li alvenis (= antaŭ lia alveno), ni rigardis televidprogramon. **Antaŭ ol** ilia domo forbrulis, ili estis sufiĉe bonhavaj. Pasos kelke da jaroj **antaŭ ol** pliboniĝos la malfacila vivsituaĉio de ĉiuj emeritoj en Pollando.

e) Post **antaŭ ol** ni povas ankaŭ uzi la infinitivon.

Ekz.: **Antaŭ ol** foriri ni ion manĝos. Vi devas zorgi esplori la aferon, **antaŭ ol** suspekti iun. **Antaŭ ol** agi, konsideru la sekvojn de via ago. En aŭtuno la migrantaj birdoj ripozadas, **antaŭ ol** flugi trans la maron.

Vortfarado kun la prepozicio *antaŭ*:

- ❖ **antaŭa** = troviĝanta antaŭe, ekz.: antaŭa parto de domo, ŝranko,
- ❖ **antaŭe** = en pozicio antaŭ io, pli frue, ekz.: Antaŭe intencu kaj poste komencu. Venu al mi unu tagon antaŭe.
- ❖ **antaŭen** = celante plue al pli antaŭa loko, ekz.: Ni iru antaŭen kun kredo plibonigi nian vivon. Ŝia vizaĝo estis direktita antaŭen.
- ❖ **antaŭi** = esti antaŭa, ekz.: Via manhorloĝo iome antaŭas.

❖ **antaŭiĝi** = veni en pli antaŭan lokon aŭ pli frue,

❖ **antaŭo, antaŭaĵo** (loke antaŭa parto, plej proksima al rigardanto)

Ekz.: Ŝi iris sur la antaŭon de la ŝipo. Post akcidento la antaŭaĵo de mia aŭto estis difektita. **antaŭulo** (tiu, kiu tempe antaŭas iun).

La prepozicio *antaŭ* funkcias ankaŭ prefiksoido:

antaŭaranĝi = aranĝi antaŭe, **antaŭpagi** = pagi pli frue, ol la kutima aŭ deviga pagodato, **antaŭvidi**, antaŭdiri, antaŭsenti, antaŭdoma, antaŭtempa, antaŭhistoria, antaŭdiluva, antaŭfesta, antaŭsigno, antaŭparolo, antaŭtago, antaŭpago, antaŭvespero, antaŭĉambro, antaŭrimedo, antaŭhaveno, antaŭurbo, antaŭlernejo.

Jen kelkaj proverboj kun la prepozicio „antaŭ” el la Proverbaro Esperanta prilaborita de Ludoviko L. Zamenhof:

- ❖ Ne laŭdu la tagon antaŭ vespero. Antaŭ vespero ne estu fiera.
- ❖ Antaŭ okuloj ne staras, doloron ne faras.
- ❖ Antaŭ mortigo de urso ne vendu ĝian felon.
- ❖ Antaŭ ĉio zorgu oficon — plezuro atentos sian vicon.
- ❖ Antaŭe intencu kaj poste komencu. Antaŭ la lango laboru la cerbo.
- ❖ Antaŭe kion vi devas, poste kion vi volas.

Josef Shemer (Israelo)

Judaj anekdotoj kaj ŝercoj

27. Du judoj sidas en restoracio. Ili ricevas du (koŝerajn...) bifstekojn sur komuna grandtelerio. Neniu rapidas preni la unua, ĉar la bifstekoj videble ne samegaltas. Ili afable insitgas unu la alian servi sin. Finfine Avraham decidas servi sin kiel la unua; li metas sur sian teleron la pli grandan pecon kaj tiam Icik prenas la restintan malpli grandan. Ili manĝas silente, sed finfine ekparolas Icik:

„Vidu, amiko Avraham, la afero ne estas grava, tamen se mi servus min la unua, mi prenus la malpli grandan bifstekon“.

Respondas Avraham: „Amiko Icik, mi sciis tion kaj pro tio mi tuj prenis la pli grandan“.

28. Estis malriĉulo, kiun ĉiuj parencoj malatentis kaj kiun neniu vizitis, eĉ unu fojon jare.

Unu tagon li fariĝis riĉa. Tiam ĉiuj liaj konatoj kaj parencoj fariĝis liaj proksimumoj kaj komencis viziti lian hejmon matene, dumtage kaj vespere.

Vidinte tion, li decidis starigi feran monkeston sur la tablon antaŭ la gastoj, dum li mem turnis la korpon kaj rigardis la muron silentante.

Ĉiuj gastoj ekmiris kaj unu el ili demandis lin: „Ĉu vi ne deziras ke ni, viaj gastoj, parolu al vi kaj interesiĝu pri via bonfarto?“

Respondis la homo: „Ĉu pro mi vi venis? Vi venis pro tio, kio staras sur la tablo. Parolu do al ĝi kaj demandu kiel ĝi fartas!“

30. Okazis entombigo de fama riĉulo. La ĉareton, kiu portis la mortinton, sekvis plorantaj parencoj kaj geamikoj.

Alvenis fremda homo kaj aliĝis al la grupanoj, same ploranta.

Demandis lin unu de la proksimumoj: „Kial vi ploras? Vi ja ne estas parenco de la mortinto“.

Resopondis la ulo: „Ĝuste pro tio mi ploras...“.

34. Tre maljuna judino el Novjorko decidis prepari testamenton kaj prizorgi siajn „lastajn dezirojn“.

Ŝi iris al la rabeno kaj diris: „Mi havas du lastajn dezirojn. Unue, mi volas ke oni kremaci mian korpon. Due, mi volas ke oni dissemu la cindron super la grandvendejo Bloomingdales“.

„Kial, s-ino Kuchenfresser?“ — demandis la mirigita rabeno.

Respondis ŝi: „Tiel ĉi mi estos certa, ke miaj du filinoj vizitos min du fojojn semajne“.

Kontinuota